# EL POPOLA ĈINIO

10

1973





Kampo de Longhaj-gubernio apud Giulong-rivero



Huj-a komunumanino de la brigado

# Riĉaj Rikoltoj de Hankju-brigado

En Ĉonghing-komunumo de Lingvu-gubernio de la Ninghia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono de Ĉinio troviĝas produkta brigado nomata Hankju, el kies membroj huj-oj okupas pli ol naŭdek-kvin procentojn.

Antaŭ la Liberiĝo Hankju estis malriĉa loko kun malfekunda salalkala tero. En printempo ĝiaj kampoj estis kovritaj de blanka alkalo kaj aŭtune ili estis kovritaj de inundakvo.


Post la Liberiĝo, precipe post la jaro 1965, Hankju multe ŝanĝiĝis dank' al la amasa movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo. La produktokvanto de greno leviĝis jaron post jaro. La pomua kaj totala produktokvantoj de greno de 1972 estis respektive pli ol trioblo de tiuj de 1964. Tial ĝi fariĝis avangarda unuo de la tuta aŭtonoma regiono en lernado de Daĝaj en agrikulturo.

Kun la disvolviĝo de produktado, iom post iom altiĝas la vivnivelo de ĝiaj komunumanoj kaj senĉese firmiĝas kaj disvolviĝas la kolektiva ekonomio, kaj prosperas nun la tuta brigado.



Komunumanoj kaj agronomiaj teknikistoj en diskutado pri produktaj rimedoj

Elektristo kontrolas linio.





Rikoltado de maizo



Riĉa rikolto jam videbla

Ambaŭ Jang Baŭĝong (*maldekstre*) kaj Ma Ĝonglin de huj- kaj han-naciecoj estas filoj de jardungitoj. Nun ili laboras kiel traktoristoj de la brigado.





Erpado



Huj-aj virinoj kaj knabinoj aĉetas kolorajn ŝtofojn.

# Ĉinio gajnis abundan somerrikolton

EN la kuranta jaro, akcelate de la kampanjo "kritiki reviziismon kaj reĝustigi laborstilon", la vastaj amasoj de kadroj kaj komunumanoj de nia kamparo daŭre disvolvis la spiriton de Daĝajanoj kaj gajnis la duan abundan somerrikolton de greno post la fondiĝo de la nova Ĉinio, post venko de seriozaj sekegeco kaj inundo per obstina batalo. La totala produktokvanto de la somere maturiĝintaj tritiko, hordeo, pizo k.a. egalas al tiu de la rekorda 1972. La ĉefaj produktejoj de la nomitaj grenoj de nia lando, la provincoj Henan, Ŝandong, Hebej, Siĉuan, Anhuj, Ŝenhi, Hubej, Gujĝoŭ, Fugian kaj Liaŭning, la aŭtonomaj regionoj Guanghi kaj Hingiang kaj la municipoj Pekino kaj Tiangin ĝenerale akiris bonan rikolton. La produktokvanto de Henan, la ĉefa produktejo de tiuj grenoj de nia lando, pliiĝis je ĉ. dekono kaj tiu de Pekino kaj Tiangin je 3 dekonoj.

De vintro de 1972 ĝis somero ĉijare, sekegeco atakis la nordan parton de nia lando. En multaj lokoj ne falis sufiĉa pluvo dum la periodo de semado ĝis maturiĝo de la nomitaj plantoj, dum iuj lokoj en la suda parto suferis de kontinua pluvo. Fronte al la seriozaj naturaj katastrofoj, la koncernaj partiaj kaj revoluciaj komitatoj de diversaj niveloj plifortigis la gvidon al la agrikultura produkto. Centmiloj da kadroj laboris kune kun la vastaj amasoj. Ĉio ĉi tio ege kuraĝigis la volon de la komunumanoj en batalo kontraŭ la katastrofoj por gajni abundan rikolton. Sin apogante sur la forto de kolektiva ekonomio de popolkomunumo kaj disvolvante la amasan movadon de lernado de Daĝaj en agrikulturo, la kamparanoj faris multajn irigaciajn konstruaĵojn. Laŭ statistikoj de la 14 nordaj provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj, de oktobro de 1972 ĝis junio de 1973, oni drilis pli ol 220,000 pumpo-putojn. La kompletigo de multaj irigaciaj konstruaĵoj kaj vasta utiligo de subtera akvo grandigis ĉiprintempe la irigaciatan areon de tritikaj kaj aliaj kampoj ĝis 9,334,000 hektaroj, kiu estas je 40% pli granda ol tiu en la sama periodo de la pasinta jaro.

Hijang-gubernio, kie troviĝas la fama Daĝaj-brigado, ne havis fojon da sufiĉa pluvo en la sinsek-


*Laborantoj de la Ŝtata Agrikultivejo de Boaj-gubernio de Henan rikoltas tritikon.*



vaj 17 monatoj antaŭ somero de la kuranta jaro, kio multe malfaciligis semadon. Sub la gvido de Ĉen Jongguj, tutlanda labormodelo kaj sekretario de la partia komitato de la nomita gubernio, ĉiuj tieaj popolanoj aktive ĵetis sin en la batalon kontraŭ sekegeco. Pene utiligante la ekzistantajn irigaciajn konstruaĵojn, ili prisemis 15,000 hektarojn da kampoj per vektoportita akvo. La popolo de Hijang kun la spirito "Arda entuziasmo kontraŭ serioza sekegeco" fariĝis lerninda ekzemplo por la kamparanoj de la tuta lando. Giangsu-provinco suferis de kontinua pluvado kaj malalta temperaturo, sed milionoj kaj milionoj da homoj partoprenis en la flegado de grenplantoj kaj gajnis bonan somerrikolton.

Ĉijare, la ŝtato plifortigis subtenon al la agrikulturo. Ĝiaj investoj al la kamparo por porakva konstruado, agrikulturaj materialoj kaj ekipaĵoj estis pli multaj ol tiuj en la pasintaj jaroj. La kvanto de kemia sterko liverita en la unua jarduono de 1973 kreskis 3 dekonojn kompare kun tiu de la sama periodo de 1972, kaj tiu de agrikulturaj pumpiloj kaj dizeloj respektive je 47% kaj 58%. La komercaj kaj trafikaj branĉoj de diversaj lokoj ĝustatempe provizis la kamparon per materialoj bezonataj en printempaj plugado kaj irigaciado. En la okupata somera rikoltado, centmiloj da laboristoj, soldatoj de ĈPLA, oficistoj, urbanoj, instruistoj kaj lernantoj iris en la kamparon por helpi komunumanojn en rikoltado kaj semado, kio garantiis la glatan plenumon de diversaj surkampaj laboroj. Post la rikoltado la komunumanoj aktive vendis grenon al la ŝtato kaj samtempe plifortigis la surkampan flegadon de aŭtune maturiĝantaj plantaĵoj por gajni abundan aŭtunrikolton de 1973.

*Hehengĉeng-brigado de Ŝangĉeng-komunumo de Hebej-provinco ricevis riĉan somerrikolton de greno.*



# Kiel la Nova Ĉinio Solvis la Problemon de Greno?

*Greno ĉiam estas ekstreme grava problemo. La malnova Ĉinio neniam solvis tiun problemon, tial ĝi estis nomata mizera kaj malsata lando. En 1949, antaŭvespere de la revolucia venko de Ĉinio, la ŝtata sekretario de Usono Acheson arogante asertis en sia letero al prezidanto Truman, ke neniu registaro de Ĉinio sukcesos solvi la problemon de nutrado de sia loĝantaro.*

*De tiam forpasis jam pli ol dudek jaroj, kaj kia estas la fakto? Kiel sciate de ĉiuj, Ĉinio kun kelkcent milionoj da loĝantoj sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ Zedong fariĝis ne nur memsufiĉa je greno sed ankaŭ havis iom superbezonan kvanton de ĝi, dank' al firma irado de la socialisma vojo, pena strebado al prospero kaj disvolvo de produkto. La fakto sendube komplete bankrotigis la profetaĵon de sinjoro Acheson.*

*Multaj el niaj legantoj ofte skribis fervore al ni leterojn por sciiĝi, kiel la nova Ĉinio sukcesis solvi la problemon de greno. Pro tio ĵurnalistoj de nia gazeto speciale intervjuis koncernajn fakojn kaj ricevis la jenajn koncizajn respondojn.*

— La Red.

**En kia mezuro kreskis la produktokvanto de greno post fondiĝo de la nova Ĉinio?**

Eble vi jam sciiĝis de niaj gazetoj ke la totala produktokvanto de greno de Ĉinio en 1970 jam superis ducent kvardek milionojn da tunoj; tiu en 1971 atingis ducent kvindek milionojn da tunoj, t.e. 2.2-oblo de tiu en 1949. En 1972 kvankam nia lando trafis seriozajn naturajn katastrofojn, tamen ĝia jara produktokvanto egalas tiun de 1970.

Kun rapida kresko de grena produkto ekŝanĝiĝis en la lastaj jaroj la situacio, ke parto de la greno bezonata de la norda Ĉinio devis esti transportata el la suda Ĉinio, ĉar la nordo longtempe ne povis produkti sufiĉe da greno por sin kontentigi. Surbaze de la memsufiĉo de nia lando la rezervita greno de la ŝtato, kolektivo kaj familio de komunumanoj multiĝis jaron post jaro. Ĉinio importas kvanton da tritiko nur por interŝanĝi malsaman specon de greno, sed eksportas rizon k. a.

Kion tio signifas? Tio montras, ke la kresko de grena produkto de nia lando en la lastaj pli ol dudek jaroj estas pli rapida ol la kresko de la loĝantaro. Dum la 24 jaroj la nombro de loĝantoj pliiĝis de pli ol 500 milionoj ĝis pli ol 700 milionoj, t. e. je 50%, sed la jara produktokvanto de greno en la sama periodo kreskis de 110 milionoj da tunoj ĝis 240 milionoj da tunoj, t. e. je pli ol 100%. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la egalmezura jara kresko de la loĝantaro estas 2%, sed tiu de greno en la sama periodo estas 4% kaj en la lastaj dek jaroj 5%.

**Sur kia bazo disvolviĝis la grenprodukto de la nova Ĉinio?**

Ĉi tie ni iom retrorigardu la staton de grena produkto de la malnova Ĉinio.

Deantikve Ĉinio estis agrikultura lando, sed al ĝi akre mankis greno. Depost la mezo de la 19-a jarcento ĝi ĉiujare devis importi grenon kaj iuj apudmaraj urboj ĉefe dependis de importitaj rizo kaj faruno. Sole en 1933 ĝi importis tri milionojn da tunoj da greno, tamen la vasta laboranta popolo ankoraŭ suferis de malsato.

Tiutempe la disvolviĝo de agrikultura produkto estis sufoke katenita de la feŭda ekspluata tersistemo. La produkta nivelo estis tre malalta pro oftaj naturaj katastrofoj kaj influado de militoj. La jara produktokvanto de greno en 1949 estis nur iom pli ol cent milionoj da tunoj. Jen estis la startpunkto de la nova Ĉinio por disvolvi la agrikulturon.

La bazo ja estis kompatinde mizera. Tamen la liberigitaj popolanoj estis tre fervoraj kaj en revolucio kaj en produkto. Observante la instrukcion de Prezidanto Maŭ Zedong **"revolucio plus produktado povas solvi la problemon de nutrado"**, la popolo faris agraran reformon kaj efektivigis agrikulturan kooperativigon. Plenumante la ĝene-



*En la jaro 1947, pekinaj studentoj manifestaciis kontraŭ malsato kaj enlanda milito.*

ralan principon de konstruado de la nacia ekonomio "**preni agrikulturon kiel bazon kaj industrion kiel gvidan faktoron**", la kamparanoj lernis de Daĝaj kaj aplikis sciencan metodon en terkulturado, dank' al kio senĉese altiĝis produktaj fortoj kaj la produktokvanto de greno atingis la hodiaŭan nivelon.

**Kian rolon ludis la agrara reformo kaj la agrikultura kolektivigo en produkto de greno?**

La bazaj kaŭzoj, ke la nova Ĉinio gajnis grandajn sukcesojn tiel en agrikulturo kiel en aliaj branĉoj de la socialisma konstruado, kuŝas en tio, ke Ĉinio traspertis radikalan demokratian kaj socialisman revolucion kaj starigis la socialisman sistemon kun publika posedsistemo de produktaj rimedoj kiel ĝia bazo.

La agrara reformo estas revolucio farita de la kamparanoj de nia lando sub la gvido de la Komunista Partio.

Oni scias, ke 70-80% de la tero en la kamparo de la malnova Ĉinio koncentriĝis en la mano de la bienuloj kaj kulakoj, kiuj okupis nur 10% de la loĝantaro de la kamparo, dum la kamparanoj, kiuj okupis 90% de la kampara loĝantaro, posedis nur 20-30% de la tero. La bienuloj kaj kulakoj meznombre akiris po ĉ. tunon da greno, dum la kamparanoj neniam estis sataj.

La agrara reformo konfiskis grandan kvanton da kampoj okupitaj de la bienuloj, kaj ĉ. sepcent milionoj da muoj da tero kaj granda nombro da plugbrutoj kaj agrikulturiloj estis distribuitaj al pli ol tricent milionoj da kamparanoj, kiuj havis neniom aŭ malmulte da tero en la pasinteco. La kompleta aboligo de la feŭda ekspluata tersistemo rapide restarigis kaj disvolvis la agrikulturan produkton.

Post la agrara reformo la kamparanoj ankoraŭ restis ĉe unuopa terkulturado. Sed tia etkamparana ekonomio estis nestabila kaj polariziĝema al riĉiĝo aŭ malriĉiĝo. Tial la Partio paŝon post paŝo kondukis la kamparanan individuan ekonomion al la socialisma kolektiva ekonomio tra la agrikultura kooperativigo en la kamparo.

En la komenco oni fondis agrikulturajn interhelpajn grupojn sur la bazo de individua mastrumado. Poste la kamparanoj organizis elementajn agrikulturajn kooperativojn kaj investis sian teron al la kooperativoj kiel akcion por unueca mastrumado. La kooperativanoj dividis la laborfruktojn laŭ la principo "pli da laboro kaj akcia tero, pli da enspezo". Post tio ĉiuj elementaj agrikulturaj kooperativoj en nia lando transiris en altgradajn agrikulturajn kooperativojn. En tiu tempo la tero apartenis jam ne al individuo sed al kooperativo. La pli grandaj altgradaj kooperativoj havis pli multajn laborfortojn kaj nuligis la rekompencon por la akcia tero. La ĉefaj produktaj rimedoj de kamparanoj estis racie aĉetitaj de kooperativo. Havante pli da monrimedoj kaj laborfortoj, la altaj kooperativoj komencis entrepreni mezgrandan kaj malgrandan fundamentan kampan konstruadon, progresigis produkton kaj multigis enspezon. La grena produktokvanto de nia lando en 1957 jam atingis 185 milionojn da tunoj, kio estis je 30.6 milionoj da tunoj pli multa ol tiu de 1952, la jaro antaŭ la agrikultura kooperativigo.

La kamparanoj pli kaj pli klare vidis en la senĉesa disvolviĝo de produktado la avantaĝon de la kolektiva ekonomio kaj plifirmigis sian decidon iri la socialisman vojon. Kun granda entuziasmo en produktado kaj forta deziro kiel eble plej baldaŭ ŝanĝi la postiĝintan fizionomion de agrikulturo de nia lando, la kamparanoj komencis entrepreni grandskalan porakvan konstruadon kaj plibonigon de grundo. Sed en tio ili renkontis multajn problemojn urĝe solvendajn kiaj racia dispozicio kaj uzado de laborfortoj en pli vasta sfero por grandskala konstruado. Ankaŭ laŭkondiĉa plantado kaj speciala kampa mastrumado bezonis racian uzon de kampoj kaj produktaj rimedoj en pli vastaj sferoj. Ĉio ĉi tio estis nesolvebla por la altgradaj agrikulturaj kooperativoj. Sub la gvido

de la Partio la popolamasoj starigis laŭ sia deziro tute novan organizan formon — la popolan komunumon. Ĝi estas organizo kun pli granda skalo kaj pli progresema posedsistemo ol la antaŭa kooperativo kaj metis firman bazon por rapida disvolviĝo de agrikulturo de nia lando (legu la artikolon "Pri la Popola Komunumo" en n-ro 2 de 1973, El Popola Ĉinio).

**Kiajn aliajn rimedojn Ĉinio prenis por disvolvi grenan produkton?**

En la jaro 1962, kiam nia popolo venkis la seriozajn naturajn katastrofojn dum tri sinsekvaj jaroj kaj klopodis por restarigi kaj disvolvi la produkton, Prezidanto Maŭ Zedong elmetis la ĝeneralan principon de nia nacia ekonomio: **"preni agrikulturon kiel bazon kaj industrion kiel gvidan faktoron"**, kio garantiis la disvolvon de agrikulturo sur la unua loko. En agrikultura produkto ni praktikis la principon **"preni grenprodukton kiel ĉefĉeneron kun samtempa disvolviĝo de aliaj, por ke la produkto disvolviĝu proporcie"**.

Ni tiel atentis pri disvolvo de la agrikulturo pro tio, ke greno estas necesa ne nur por la popola vivo, sed ankaŭ por la industrio, agrikulturo, komerco, eduko kaj aliaj aferoj. Ankaŭ kapitalo por disvolvo de la socialisma industrio fontas el interna akumulado de la industrio kaj agrikulturo. La vasta kamparo liveras ĉiujn agrikulturajn kaj flankajn produktaĵojn bezonatajn de la lando kaj samtempe estas ĉefa merkato de industriaj produktaĵoj. Disvolviĝo de agrikulturo stimulas progreson de industrio. Krome nia lando ankaŭ devas rezervi sufiĉan kvanton da greno por sin prepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj surpriza atako de eksterlandaj agresantoj.

Ĝuste pro tio la diversaj branĉoj de la ŝtato forte subtenas la agrikulturon en la flanko de laborforto, materialoj, financo kaj tekniko.

La industrio subtenas la agrikulturon ĉefe per maŝinoj, kemia sterko kaj insekticido. Antaŭ la Liberiĝo Ĉinio ne havis industrion de agrikulturaj maŝinoj. Sed nun plejparto de la provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj jam starigis siajn fabrikojn de traktoro, motorhavaj maŝinoj kaj aliaj. Ekde la Granda Proletara Kultura Revolucio la malgrandaj fabrikoj de fero, ŝtalo, kemia sterko, cemento, elektro kaj malgrandaj karbominejoj starigitaj en diversaj lokoj ludis gravan rolon en subtenado al la agrikulturo. Ekzemple, la kvanto de kemia sterko produktita de la malgrandaj kemisterkaj fabrikoj en 1971 superis duonon de la totala produktokvanto de la tuta lando.

La agrikultura imposto estas malpeza. La ŝtato ne altigis imposton al komunumoj kaj brigadoj kiuj havis riĉan rikolton, sed nuligas la imposton al tiuj trafitaj de naturaj katastrofoj. La proporcio de agrikultura imposto kontraŭ la totala enspezo de la agrikulturo iom post iom reduktiĝis de 12% en 1953 ĝis 6% en 1970. Krome la ŝtato ĉiujare asignas grandan sumon da investoj por kampaj porakvaj konstruadoj kaj la ŝtataj bankoj liveras grandkvantan agrikulturan pruntedonon kun malalta interezo.


Post sia fondiĝo la nova Ĉinio plurfoje altigis la aĉetprezon de agrikulturaj kaj flankaj produktaĵoj kaj malpliigis la vendprezon de agrikulturaj produktaj rimedoj. La prezaro de ĉiutagaj vivbezonaĵoj por la urba kaj vilaĝa loĝantaro ĉiam estas stabila. Nur post la kultura revolucio, tia preza politiko favoras la popolon per dek unu miliardoj da juanoj, en kiuj la kamparanoj estis plej favorataj.

Dank' al la atento kaj klopodado de la tuta Partio kaj la tuta popolo kaj la movado de lernado de Daĝaj ekde 1964, la agrikulturo de nia lando ricevis riĉan rikolton en sinsekvaj dek jaroj de 1962 ĝis 1971.

**Kiel la "lerno de Daĝaj en agrikulturo" akcelis disvolviĝon de la agrikultura produkto?**

Daĝaj-brigado estas ekzemplo de niaj kamparanoj en reformado de la naturo. Eksterlandaj

*Forbruligo de teraktoj*



*Liberigitaj kamparanoj ricevis teron.*



amikoj vizitintaj Daĝaj facile povas kompreni la signifon de tiuj vortoj.

Antaŭ la Liberiĝo Daĝaj estis tre malriĉa montvilaĝo en Tajhang-montaro de norda Ĉinio. Ĝiaj 53 hektaroj da agro en pli ol 4,700 parceloj dislokiĝis sur deklivoj kaj en valoj kaj la hektara produktokvanto estis nur ĉ. 750 kilogramoj. Post la Liberiĝo la kamparanoj de Daĝaj firme persistis ĉe la socialisma vojo sub la gvido de Ĉen Jongguj, sekretario de la partia filio de la brigado kaj klopodadis por ŝanĝi ĝian fizionomion. Ili konstruis kelkcent ŝtonbaraĵojn sur deklivoj kaj en valoj kaj reformis la sterilajn kampojn serioze detruitajn de pluvego en ŝtuparkampojn donantajn stabilajn bonrikoltojn. En la jaro 1971 hektara produktokvanto atingis 8,175 kilogramojn.


En la jaro 1964 Prezidanto Maŭ elmetis al la kamparanoj de la tuta lando la sloganon: **"Lerni de Daĝaj en agrikulturo"**. Instigate de Daĝaj-brigado, la kamparanoj diris: "Kion Daĝaj-brigado povis fari, ankaŭ ni povos." De tiam la tutlanda kamparo prenis Daĝaj kiel ekzemplon kaj levis altan tajdon por reformi naturon kaj disvolvi produkton.

En tiuj pluraj jaroj okazis grandaj ŝanĝiĝoj en la norda Ĉinio.

Supre ni jam diris ke la agrikulturo en la malnova Ĉinio estis ekstreme postiĝinta, precipe en ĝiaj nordaj provincoj Hebej, Ŝandong, Henan, Liaŭning kaj aliaj lokoj. La antaŭaj feŭdaj dinastioj kaj la reakcia kuomintang-a registaro ĉiujare devis transporti grandan kvanton da greno el la Sudo por nutri la ŝtatajn oficistojn kaj la armeon kun la celo teni sian reakcian regadon. Tamen la popolanoj en la Nordo ĉiam vivis malsate.

Post fondiĝo de la nova Ĉinio la grena produkto en la Nordo havis kreskon. Sed Liu Ŝaŭki kaj similaj kun la intenco restaŭri kapitalismon emfazis, ke la Nordo kun pli da industrio ne povas fariĝi memsufiĉa je greno kaj nepre devas alporti grenon de aliaj lokoj. Tio multe baris la disvolviĝon de agrikulturo kaj la Nordo longe ne povis produkti sufiĉe da geno por sia bezono. En la kultura revolucio la popolamasoj faris fortan kritikon al la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki kaj plie disvolvis lernadon de Daĝaj, tiel ke iom post iom ŝanĝiĝis la malnova fizionomio de la Nordo.

*Traktoroj produktitaj de la Ĉangĝoŭ-a Traktora Fabriko de Giangsu-provinco*




Henan-provinco estas bona ekzemplo. Tiu provinco estis ofte plagita de trosekeco, inundo kaj alkaleco en la historio kaj ĉiam estis en akra manko de greno. En la lastaj kelkaj jaroj la popolo de Henan pene strebadis al prospero kaj konstruis pli ol 2,000 grandajn, mezajn kaj malgrandajn akvorezervejojn kaj 14,000 irigaciajn kanalojn en sekaj montregionoj, kaj en ebenaj regionoj fosis 400,000 maŝinputojn. La irigaciata areo de la tuta provinco nombris je 2,900,000 hektaroj kaj okdek pocentoj de facile inundeblaj kaj sal-alkalaj kampoj estis reformitaj kaj senĉese kreskas la grena produkto.

En la jaro 1970 la produktokvanto de greno en Henan jam superis 15,000,000 tunojn kaj tiu daŭre kreskis en la lastaj jaroj. Nun krom kontentigi sian bezonon Henan jam havis superbezonan grenon.

En la regionoj kun bonaj kondiĉoj la komunumanoj kun pli da energio kulturis la kampojn kaj multe sterkis ilin por produkti pli multe da greno. La meznombra hektara produktokvanto en la provincoj Ĝegiang, Guangdong kaj Ŝanhajo jam superis la normon difinitan de la ŝtato.

*Akvedukto konstruita de Kihian-komunumo de Ŝandong-provinco*



**Kiamaniere la ĉina registaro garantias la grenan provizadon al la loĝantaro?**

Kiam naskiĝis la nova Ĉinio, streĉa estis la grena provizado. La Komunista Partio de Ĉinio kaj la popola registaro ĉiel klopodis por produkti pli da greno kaj samtempe faris multajn laborojn en grenprovizado por garantii la vivon de la popolo. En la jaro 1953 la ŝtato fermis la liberan gren-merkaton kaj praktikis laŭplanan aĉetadon kaj laŭplanan provizadon de greno por unuece administri grenan aferon. Ĉio ĉi tio celis al tio ke la registaro havu grenon por garantii racian provizadon al la popolo, nutraĵ-industrio kaj aliaj branĉoj.

En laŭplana aĉetado de greno la ŝtato konsideris la interesojn de la ŝtato, kolektivo kaj individuo. Ĝi aĉetis nur la restan parton post rezervo de sufiĉa greno por semoj, brutoj kaj la vivo de komunumanoj. La aĉetkvanto estas fundamente stabila. Je riĉa rikolto la ŝtato malmulte pliigis aĉetan kvanton, kaj je malbona rikolto pro katastrofoj ĝi malpliigis la aĉetkvanton aŭ inverse liveris grenon.

La ŝtato liveras grenon laŭ la principo de unueca planado, detala konsiderado kaj racia distribuado, ekirante de la punkto ke Ĉinio havas kelkcent milionojn da loĝantoj. Ekzemple la loĝantoj en urboj, fabrikoj kaj minejoj povas ricevi sufiĉan porcian grenon laŭ sia aĝo kaj laborintenseco. Kaj samtempe la liverita kvanto de flankaj manĝaĵoj estas plimultigita. La porcia greno de kamparanoj en la regionoj de ekonomiaj plantoj estas garantiata je la nivelo de la najbaraj grenproduktaj regionoj.

Nun neniu bezonis zorgi pri sia manĝo, kiel oni en la malnova Ĉinio. Ĉiu laboras kun plena energio por bela estonteco de la socialisma patrolando.

**Kion la registaro faros se okazos naturaj katastrofoj?**

Ĉinio estas vasta, tial ofte okazas naturaj katastrofoj en tiu aŭ alia parto de la lando.

Menciante la problemon de greno en la plagitaj regionoj oni nature rememoris la suferojn en



*Post sia elektiĝo kiel kandidata membro de la Naŭa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, Guo Honggie, sekretario de la partia filio de Guoĝuang-brigado, ĉiam tenas sian kutimon de laboremo. Jen li rikoltas tritikon kune kun komunumanoj.*

la malnova socio. Antaŭ la Liberiĝo, en la regionoj trafitaj de seriozaj naturaj katastrofoj la kampoj dezertiĝis, la produkto malprosperis, la laborantaj popolanoj devis forvendi siajn infanojn kaj migradis kiel almozuloj. Nombro el ili mortis de malsato.

Depost la fondiĝo de la nova Ĉinio la vastaj popolamasoj sub la gvido de la Partio kaj registaro faris grandskalan reordigon de riveroj kaj montoj. Precipe oni jam fundamente jungis la plej danĝerajn Flavan Riveron, Huajhe-riveron kaj Hajhe-riveron. Ankaŭ la grandskala fundamenta kampa konstruado de la tuta lando altigis rezistpovon kontraŭ naturaj katastrofoj. Se en iuj lokoj okazos katastrofoj, la Partio kaj registaro donos grandan zorgon kaj faros ĉion por liveri grenon al la plagitaj lokoj.

En 1956 okazis inundego en Hebej-provinco. Tiam la ŝtato transportis al Hebej pli ol 1,500,000 tunojn da greno. Plejparto de la greno venis de malproksimaj lokoj de Ĉinio kaj ĝia transporta kosto estis pli granda, sed pagita tute de la ŝtato por malŝarĝi la plagitan loĝantaron.

La 6-an de februaro ĉijare okazis en la Ganzi-a Tibetana Aŭtonoma Subprovinco de Siĉuan forta sismo, kiu kaŭzis domaĝon al la vivo kaj havaĵo de la tiea popolo. La CK de KPĈ kaj la partia komitato de Siĉuan-provinco kaj diversaj branĉoj de la registaro sendis delegaciojn por konsoli la plagitan loĝantaron kaj ĝustatempe portis tien grenon kaj aliajn materialojn, kaj granda parto de manĝaĵo estis paraŝutigita per aeroplanoj. La zorgo kaj helpo de la Partio kaj registaro forte kuraĝigis kaj helpis la popolanojn en batalo por venki la katastrofon kaj rekonstrui sian hejmlokon.

**Kiamaniere la nova Ĉinio longtempe tenas la prezon de greno en stabileco?**

Stabiligo de varprezo estas grava politiko de la socialisma ekonomio de nia lando. Greno estas plej grava por la popolo, tial stabiligi la prezon de greno ludas gravan rolon kaj por la vivo de la popolo kaj por la merkata prezaro.

Kiel supre dirite, tuj post la fondiĝo de la nova Ĉinio la Komunista Partio kaj la popola registaro jam komencis klopodi por stabiligi la prezon de greno per disvolvo de produkto kaj akordigo de provizo kaj bezono de greno. En marto de 1950, nome post duonjaro de sia naskiĝo la nova Ĉinio jam finis la situacion de flugrapida altiĝo de grenprezo longe daŭrinta en la malnova Ĉinio. La libera merkato de greno estis nuligita, aĉetado kaj provizado de greno estis planigita, tial bezono de diversaj flankoj je greno estis garantiata; grena spekulacio malutila al la popolo estis ekstermita, tial la grena prezo fariĝis pli stabila.

Nun la prezo de kilogramo da tritikfaruno kaj rizo estas respektive 35 kaj 30 cendoj, kaj al la

prezo de tiuj kaj aliaj grenoj fundamente ne okazis ŝanĝo ekde la jaro 1953.

Homoj kiuj vivis en la malnova socio estas profunde kortuŝitaj de tio.

En Gujĝoŭ-provinco troviĝas avo Kiaŭ kun aĝo de 81 jaroj, kiu ĉiutage notis la varieman merkatan prezon de greno komence de 1908. Laŭ liaj registroj oni povas vidi, ke la prezo de greno de 1913 ĝis 1939 estis ekstreme variema; kaj tiu de 1940 ĝis 1949 rekte altiĝis 207,642-oble. Sed li ĉesigis la notadon en 1950, dirante: "Nun la merkata prezo de greno ĉiam restas la sama kaj ne necesas ĝin noti."

En la malnova socio la prezo de greno senĉese leviĝis pro tio, ke la reakcia kuomintang-a registaro, bienularo kaj burĝaro monopolis la grenon kaj furiozis grena spekulacio kaj akaparado. Aŭtune kiam granda kvanto da greno estis vendata al merkato, bienuloj kaj fikomercistoj enaĉetis ĝin je malalta prezo por akaparado. En malfrua printempo kaj frua somero, kiam la malnova greno estas jam forkonsumita kaj la nova ankoraŭ ne rikoltita, ili altigis la prezon por profitegi. La popolanoj de la plagitaj kaj grenmankaj regionoj estis plej kruele ekspluatitaj de ili.

Ĉio ĉi tio jam forpasis senrevene. La popola registaro delonge jam nuligis la intersezonajn diferencojn de prezo. Surbaze de stabileco de grena prezo la aĉetprezo plurfoje altiĝis, pligrandmezure en la ekonomie postiĝintaj regionoj kaj tiuj de nacimalplimultoj. La domaĝo pro tia faro kaj la elspezo por transportado kaj konservado estis tute ŝtopita de la ŝtato. Tio multigis enspezon de la kamparanoj sed ne ŝarĝis la urban loĝantaron.

Fine la koncernaj fakoj diris al la intervjuistoj: Nun la agrikulturo de nia lando jam multe progresis kompare kun tiu en la malnova Ĉinio. Sed Ĉinio estas disvolviĝanta lando kaj la agrikultura produkto ankoraŭ troviĝas en relative malalta nivelo. Tamen granda estas ĝia latenta forto. Se oni plene disvolvos la avantaĝon de la kolektiva ekonomio de la popola komunumo kaj daŭre klopodos, oni certe povos pluapaŝe ŝanĝi la fizionomion de la agrikulturo en ne tre longa tempo kaj produkti pli da greno.



*Traktora stacio de Kilijing-brigado*



# AKUMULADO DE GRENO

DUM sia batalo kontraŭ la naturo, la kamparanoj de nia lando delonge havis la deziron akumuli grenon por pasigi katastrofon. Tamen en la longa tempo de la malnova socio, ili penlaboradis tutjare sed ne povis akiri sufiĉan manĝaĵon por sin satigi kaj neniam povis akumuli grenon. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, precipe en la lastaj jaroj, la produktokvanto de greno pli kaj pli grandiĝis kaj multaj komunumoj kaj produktaj grupoj ekhavis kolektivan rezervitan grenon kaj iliaj komunumanoj sian superbezonan grenon.

Kiel ekzemplon ĉi sube ni prezentu al vi Vudu-komunumon de Jugan-gubernio, Gianghi-provinco.

## TRI KATASTROFOJ, TRI REZULTOJ

En somero de la kuranta jaro, Vudu-komunumo trafis inundon pro pluvego kaj 60 % de ĝiaj fruaj rizplantoj estis detruitaj. Sed, la produktaj grupoj kaj la komunumanoj neniom maltrankviliĝis pro tio dank' al la akumulado de greno en la lastaj jaroj. La komunumo faris bonan aranĝon por la vivo de la komunumanoj nur per 9.5 %, t.e. ĉ. 500 tunoj de la komunuma kolektiva akumulita greno. La akumulita greno de la komunumanoj de Linghia-produktogrupo estis tiel multa, ke ili ne nur ne bezonis uzi la kolektivan akumulitan grenon de la grupo, sed eĉ havis restaĵon de greno post paso de la katastrofo. Dum batalo kontraŭ la katastrofo, ili fordrenis la pluvakvon el la kampoj per siaj pumpmaŝinoj en duona monato kaj ĝustatempe plantis la malfruajn rizplantidojn.

Tio estas la unua fojo, ke la komunumo venkis la naturan katastrofon per sia akumulita greno. Maljunaj komunumanoj diris emocie: "En la malnova socio, katastrofo signifis suferon por la kamparanoj; sed nun ni havas akumulitan grenon, la vivo estas garantiata kaj ni havas forton por disvolvi la produktadon." Ju pli pliboniĝas la vivo, des pli la maljunaj kamparanoj ne povas forgesi la mizerplenan vivon en la pasinteco.

Estis somero de 1935. Breĉiĝis la digo proksime de Vudu kaj multaj ĉirkaŭaj vilaĝoj kaj kampoj estis inunditaj kaj tute detruiĝis la grenplantaĵoj. Pro manko de manĝaĵo kaj vestoj, multaj kamparanoj forfuĝis kaj fariĝis almozuloj. El la 21 familioj de iu vilaĝeto, 17 fuĝis aliloken por trovi vivrimedon kaj 16 vilaĝanoj mortis pro malsato kaj frosto. Malriĉkamparano Liu Ginhiang rakontis jene pri travivaĵo en tiu tempo: "La kvar membroj de mia familio forfuĝis post la katastrofo. Mia patro portis palankenon por bienulo, mia patrino almozpetis kunportante mian frateton kaj mi servis al bienulo paŝtante bovojn, kondukante ĉaron kaj farante diversajn penigajn laborojn. Kvankam ni penlaboregis mortlace, tamen ni ankoraŭ ne povis akiri sufiĉan manĝaĵon kaj vestaĵon."

En la komenca periodo post la Liberiĝo, la agrikulturo de Vudu komencis disvolviĝi, tamen la kamparanoj ankoraŭ ne havis akumulitan grenon. En 1954, Vudu trafis maloftan inundon kaj rikoltis neniun grajnon en la jaro. Tiam, la ŝtato devis alporti 5,000 tunojn da greno de alia loko, por helpi la kamparanojn trapasi la katastrofon. La kampa-

ranoj tre dankis la zorgon de la Komunista Partio kaj la Popola Registaro al ili, dirante: "Ankaŭ ni kamparanoj devas memrezervi iom da greno por bezono okaze de natura katastrofo kaj tiel malpezigi la ŝarĝon de la ŝtato."

Por efektivigi la multjaran deziron, ili organizis sin sub la gvido de la Partio kaj disvolvis la produktadon de greno per la kolektivaj fortoj.


## DE MANKO AL ABUNDO DE GRENO

En la areo de Vudu ofte okazis sekegeco kaj inundo. Tie la kampoj estis sterilaj kaj la pomua produktokvanto de greno estis nur 100-150 kilogramoj. En certa periodo post la Liberiĝo, ĉiujare la ŝtato devis liveri al la tieaj loĝantoj 1,000 tunojn da greno.

Post la fondiĝo de Vudu-popolkomunumo, ĝia partia komitato koncentris la fortojn de la komunumanoj al konstruado de digoj kaj irigaciaj kanaloj, al disvolvado de maŝinaj irigaciado kaj drenado kaj al reformo de grundo. Sekve de la senĉesa pliboniĝo de la produktaj kondiĉoj, stabile plialtiĝis la produktokvanto de greno. En 1962, la komunumo jam produktis tiom da greno kiom super sia bezono. De 1962 ĝis 1972, tiu ĉi komunumo fosis 63 irigaciajn kanalojn kun totala longeco de 97.5 kilometroj, konstruis 200 hektarojn da kampoj post formovo de sablomonteto, starigis 20 malgrandajn elektrajn pumpstaciojn kaj aĉetis 114 pumpmaŝinojn, per kiuj fundamente efektiviĝis mekanikigo de irigacio kaj drenado kaj necesaj irigacio kaj drenado farataj ĝustatempe. En la lastaj dek jaroj, la produktokvanto de greno de la tuta komunumo kreskis meznombre je 10.26% en ĉiu jaro. La meznombra pomua produktokvanto de 1972 estis 532 kilogramoj, t.e. 2.35-oblo de tiu de la jaro 1962. La jara meznombra grenporcio de ĉiu komunumano estis 284 kilogramoj kaj tiu de iuj produktaj grupoj atingis 300 kilogramojn, t.e. 1.52-oblo de tiu de 1962. La malriĉa kaj postiĝinta Vudu ekhavis novan fizionomion.

## IOM DA AKUMULO EN ĈIU JARO

Ĉiujare Vudu-komunumo laŭplane liveris sian kontingenton da imposta greno kaj vendis superbezonan grenon. En la pasintaj 10 jaroj, ĝi liveris al la ŝtato entute 47,750 tunojn da greno. Ĉiufoje post riĉa rikolto, la vastaj amasoj de komunumanoj volas antaŭ ĉio vendi multe da superbezona greno al la ŝtato por subteni la socialisman konstruadon de la patrolando. En 1971, la grenprodukto de



*Laboranto de la Vudu-a Grentenejo (m e z e) kontrolas sekigatan grenon por rezervado kune kun kadroj kaj membroj de la komunumo.*

Davan-produktogrupo kreskis je 25 tunoj. Post demokratia diskutado, la komunumanoj decidis vendi 10 tunojn al la ŝtato, teni 10 tunojn kiel kolektivan rezervon kaj dividi 5 tunojn inter komunumanoj.

Parto de la superbezona greno de la produktaj grupoj kaj komunumoj estas rezervata post plenumo de la grenlivera tasko al la ŝtato, divido de grenporcioj al la komunumanoj kaj elpreno de semoj kaj greno bezonata por brutobredado, laŭ la volo de la komunumanoj, por pasigi eventualan naturan katastrofon kaj agresan militon de imperiismo. Nun ĉiuj produktaj grupoj de Vudu-komunumo jam havas kolektivan rezervitan grenon kaj 90% de la komunumanaj familioj havas sian grenrezervon.

La kolektivoj kaj individuoj akumulas rezervan grenon ĉiujare laŭ la rikolto, nome en jaro riĉrikolta iom pli multe ol ordinare. En 1962, Vudu-komunumo ricevis bonan rikolton kaj rezervis 20 tunojn da greno. En 1969, la kvanto de la rezervita greno de tiu komunumo multiĝis ĝis 2,950 tunoj, kaj en printempo de 1973 la tuta komunumo jam akumulis 6,050 tunojn da rezervita greno. Tiu kvanto sufiĉas por nutri la membrojn de la tuta komunumo dum 11 monatoj. Iuj el la produktaj grupoj nun jam havas rezervitan grenon por siaj membroj en konsumado de 2 jaroj.

La familio de komunumano Ĝang Fuŝun havas ses membrojn. En riĉrikoltaj jaroj ili ŝpareme uzas grenon laŭplane, zorgante pri bezono en tagoj de katastrofo kaj akumulis 1,800 kilogramojn da rezervita greno en la lastaj jaroj. Iu komunumanino ĉiujare akumulis grenon kaj nun jam havas 400 kilogramojn da greno en rezervo. Tiaj ekzemploj troviĝas ĉie en Vudu-komunumo.

Por bone uzi kaj administri la akumulitan grenon, Vudu-komunumo organizis administran grupon el kadroj kaj komunumanoj kaj specialaj personoj estas asignitaj por libroteni kaj kontroli en difinita periodo. La rezervita greno de multaj produktaj grupoj estas bone konservita kaj ne estas detruita de insektoj, ratoj kaj ŝimo.

---

# PAROLO PRI GRENO

de **HIAŬ HJUEŜENG**

LA pli ol 800 grenvendejoj punktis la stratojn de Pekino. Antaŭ nelonge mi vizitis la grenvendejon Hongkiaŭ. Ĝi situas proksime de Longhjugoŭ, sudoriente en Pekino. Antaŭ la Liberiĝo Longhjugoŭ estis fetora nefermita kloako kaj ambaŭflanke de ĝi loĝis ekspluatataj kaj subpremataj malriĉuloj. Nun la fetora kloako estas ŝtopita kaj la malriĉuloj fariĝis mastroj de la lando kaj tute ŝanĝiĝis tiu loko.

La grenvendejo ne estas granda, bonorde staras en ĝi altaj staplitaj grensakoj. Sur malgranda nigratabulo estas skribita la unueca prezaro de greno. La 5 laborantoj de la vendejo ĉiumonate provizas la ĉirkaŭe 600 loĝantajn familiojn kun preskaŭ 3,000 personoj per greno liverita de la ŝtato. La malnovaj laborantoj de la grenvendejo kaj la ĉirkaŭaj multjaraj loĝantoj travivis la du epokojn de malnova kaj nova Ĉinio kaj, parolante pri grenprovizo, ili havas multon por diri . . .

## POR ĈIAM FORPASIS LA MALSATAJ TAGOJ

En tiu sama domo, antaŭ la Liberiĝo funkciis privata grenvendejo Tongzengfu. La ĉirkaŭaj multjaraj loĝantoj nun ankoraŭ memoras, kiel homoj kunpremiĝis antaŭ la grenvendejo por aĉeti "miksitan farunon".

En 1943, por savi sin el la sorto de fiasko, la japanaj imperiistoj pliintensigis sian prirabadon al la ĉina popolo kaj eksportis al Japanio grandan kvanton da rabita greno. Samtempe, ili praktikis en la norda Ĉinio monopoligon de greno. La urbaj malriĉuloj, kiuj ĉiam klopodegis por akiri

manĝaĵon, dronis en pli grandan malfacilon. Je la publikigo de la dekreto pri monopoligo de greno de la japanaj agresantoj, la greno en la vendejoj kaj staplejoj de la urbo estis tute frostigita. La agresantoj aĉetis ĉiom da greno je kvinono de la prezo kaj poste faris el parto de la greno la tiel nomatan "miksitan farunon" por provizi per ĝi la urbanojn.

La tiamaj japanaj kaj pupaj ĵurnaloj propagandis, ke la "miksita faruno" estis farita el rizo, tritiko kaj multaj aliaj specoj de greno, ke la faruno entenas riĉajn nutraĵojn. Fakte tio estis absoluta trompo. Liu Zongfu, respondeculo de la grenvendejo Hongkiaŭ, faris rememoron: "Tiutempe mi estis komizo en iu grenvendejo. La 'miksita faruno' enhavis neniom da rizo aŭ tritiko, sed nur sojfaban rekrementon, branon de maizo kaj sorgo, ŝiman branon kaj malplenajn grajnojn kolektitajn mikse kun tero en la fundoj de grentenejoj, kaj iafoje oni trovis en la faruno eĉ musan fekaĵon. Ĉu tia faruno estas manĝebla por homoj?"

Sed kion alian la laboranta popolo povis akiri krom la "miksita faruno"? Tiutempe, la malriĉaj loĝantoj de Longhjugoŭ laboregis tuttage kaj akiris malmultan rekompencon. En la sekvinta tago, antaŭ la tagiĝo, ili devis kuri al Tongzengfu aŭ aliaj grenvendejoj por aĉeti "miksitan farunon". Se iu iom malfruiĝis, li eĉ tion ne povis havigi al si kaj lia familio devis suferi malsaton. El la maljunaj loĝantoj, kiujn mi vizitis, ĉiu perdis siajn familianojn tiam pro malsato. Li Ŝuĝen naskis antaŭ la Liberiĝo 4 infanojn, el kiuj 3 mortis pro malsato aŭ malsano. Caj Hiuhong havis 12 gefratojn, sed ĝis la Liberiĝo nur ŝi sola restis viva. Unu el ŝiaj pliaĝaj fratoj mortis en la aĝo de 24 jaroj. Tiu aĝo ja estas bona tempo. Sed li estis terure marasma pro malsato. Foje li estis tiranta ĵinrikŝon kaj falis teren morta ĉe la ĉirkaŭmuro de la Ĉiela Altaro. Malsato forrabis ankaŭ la vivon de la edzo kaj filino de onklino He. En tiu timpo, sur stratetoj, en muranguloj . . . oni ofte trovis mortinton de malsato. Eĉ malvaste distribuata reakcia ĵurnalo *Fakto* de Bejping (la nuna Pekino) raportis ke, en printempo kaj somero de 1943, en la urbo mortis meznombre 300 homoj ĉiutage pro malsato. Tamen, en la staplejoj de japanaj agresantoj ĉe la Ĉiela Altaro, Jongding-pordego k.a. lokoj proksimaj de Longhjugoŭ, greno amasiĝis kiel monteto kaj en la japanaj kazernoj la agresantoj grasigis siajn militajn ĉevalojn per hordeo kaj sojfabo.

Post la kapitulaco de la japanaj imperiistoj, reakciuloj de Kuomintango lanĉis la kontraŭkomunisman kaj kontraŭpopolan enlandan militon tute ignorante la vivon de la popolo. La laboranta



*Liu Zongfu*

popolo de la regionoj regataj de kuomintangaj reakciuloj daŭre baraktis en malsato. En januaro de 1949, kiam Bejping estis liberigita, la grenvendejoj de la urbo havis nur branon kaj nigran sojfabon por vendi.

Malnovaj loĝantoj de Pekino klare memoras, ke tuj post la liberigo de Pekino, la popola registaro alportis el la malnovaj liberigitaj regionoj multe da greno al ĝi, kaj la pekina laboranta popolo finis la mizerajn tagojn de malsato.

## STABILA PREZARO DE GRENO

Nun la loĝantoj de Longhjugoŭ ĉiutempe povas aĉeti rizon, tritikan aŭ maizan farunon en Hongkiaŭ kaj aliaj grenvendejoj. La prezoj de greno restas longe stabilaj.

Por senĉese plibonigi la vivon de la vastaj amasoj de kamparanoj, la popola registaro plurfoje altigis la aĉetprezojn de greno post la Liberiĝo. Sed nur al malmultaj specoj de greno la vendprezoj estis ŝanĝitaj en 1966: La prezo de kilogramo da tritika faruno altiĝis de 36.8 cendoj ĝis 37, tiu de rizo de 29.6 ĝis 30.4. La deficito inter la vend- kaj aĉet-prezo estas kompensita de la ŝtato. Liu Zongfu, kiu laboris 38 jarojn en grenvendejo, diris kun profunda kompreno: "La popola registaro ĉiam zorgas pri la popolo. En 1966, la prezo de kg. da greno altiĝis nur je kelkaj dekonoj da cendo, sed antaŭ la altigo oni ripetade eksplikis pri la kialo en fabrikoj, oficejoj, loĝkvartaloj ktp. Kontraŭe, la reakcia

registaro antaŭ la Liberiĝo neniam tion faris. Ĝi altigis la prezojn laŭplaĉe. Kaj ĉiu grenvendejo havis sian propran prezaron."

Antaŭ la Liberiĝo, la fluga altigo de grenprezo plej multe suferigis la laborantan popolon. Li Ŝuĝen diris al mi, ke antaŭ la Liberiĝo ŝia edzo vivtenis la familion per tirado de ĵinrikŝo. Ĉiumatene, elirante el sia hejmo, li ĉiam kunportis kun si saketon. Kiam li perlaboris kelke da mono, li tuj rapidis al grenvendejo por aĉeti grenon. Se li iom malfruiĝis, li devis aĉeti je multe pli alta prezo. Iu triciklisto veturigis pasaĝeron de Sidan-strato al la Antaŭa Pordego. Kiam li startis de Sidan-strato, kilogramo da maizfaruno kostis 84,000 juanojn de leĝa mono, sed kiam li atingis la Antaŭan Pordegon post nur pli ol 20 minutoj, la prezo jam altiĝis ĝis 176,000.

En la periodo de la Liberiga Milito, la prezo de greno en la regionoj regataj de reakciuloj de Kuomintango senĉese leviĝis kvazaŭ balono sen fadeno. Laŭ la noto de historia materialo, en junio de 1937 ĉiu *dan* (ĉina mezurunuo de pezo, egalas al 60 kg.) da rizo kostis 11 juanojn de leĝa mono, sed en aprilo de 1949, antaŭ la disfalo de la reakcia registaro de Kuomintango, la prezo altiĝis ĝis 175,000,000 juanoj de or-juan-a bileto, kiuj egalis al 525,900 miliardoj da juanoj de leĝa mono. En 12 jaroj la prezo de rizo altiĝis je 47,800,000,000,000-oblo.

Hodiaŭ, kiam oni denove legas tiajn astronomiajn ciferojn kaj rememoras la malsatajn tagojn en la malnova socio, ili sentas sin kvazaŭ havinta inkubon. 24 jaroj forpasis, sed ĉiuj tiuj malfeliĉaĵoj jam fariĝis tiel malproksimaj de nia nuna vivo.

## LA FELIĈAJ LOĜANTOJ

Nun la loĝantoj ĉirkaŭ la grenvendejo Hongkiaŭ ankoraŭ nomas kutime la lokon Longhjugoŭ, kvankam la kloako jam estis plenigita baldaŭ post la Liberiĝo. Dank' al la racia aranĝo de la popola registaro, la laboruloj, kiuj ne havis fiksan profesion antaŭ la Liberiĝo, jam havas laboron. Ankaŭ dommastrinoj organizis sin en produktajn grupojn, kontribuante sian forton al la socialisma konstruado.

Ni revenu al la malnovaj loĝantoj supre menciitaj.

Li Ŝuĝen fariĝis infanfianĉino en la aĝo de 11 jaroj kaj neniam havis satan manĝon antaŭ la Liberiĝo. Nun kiel siaj edzo kaj infano, ankaŭ ŝi havas profesion. Mi vidis ŝin en tajlora grupo de ŝia loĝkvartalo. Ŝi diris al mi ĝoje: "En la pasinteco ni ofte ne havis monon por aĉeti kilogramon da




*Caj Hiuhong (maldekstre) laboras en produkta grupo de sia loĝkvartalo.*


'miksita faruno'. Sed nun ni povas akiri sufiĉan rizon kaj rafinitan tritikan farunon. Antaŭe ni nur kolektis forĵetitajn legomojn, sed nun ni ĉiutage havas freŝajn legomojn. Nia vivo fariĝas vere pli kaj pli bona!"

Nun la familio de Caj Hiuhong neniam estos trafita de la sorto de ŝiaj gefratoj. Ŝiaj unuaj 5 infanoj jam havas profesion. Ŝi kaj ŝia edzo ĉiumonate perlaboras 98 juanojn. Nur la plej juna filo ne havas profesion. Ĉiumonate ŝi elspezas 17 juanojn por greno de la tri homoj. Ŝi ankaŭ estas kadro de la loĝkvartala komitato. Ŝi diris: "La vivo estas garantiata, tial mi sentas min ĝoja kvankam la laboro estas multa."

72-jara avino He loĝas tuj apud la grenvendejo Hongkiaŭ. Antaŭ la Liberiĝo ŝi devis vivteni kvar infanojn kaj la vivo estis pli amara ol koptiso. Hodiaŭ la tri generacioj de ŝia familio ĝoje vivas kune. Ĉiuj 14 plenaĝuloj havas profesion kaj 8 infanoj vizitas lernejojn. Tage en la domo restas nur ŝi kaj 2.5-jara nepo. Restante kun la vigla kaj aminda infano, la avino sentas senliman ĝojon kaj la sulkoj sur ŝia vizaĝo sereniĝas pro feliĉa rido.



*Onklino He kaj ŝia nepo*



## RAPIDA KRESKO DE LA PRODUKTO-KVANTO DE RADIORICEVILOJ KAJ TELEVIDILOJ


La produktado de radioriceviloj kaj televidiloj rapide disvolviĝis en la urboj Ŝanhajo, Pekino kaj la provincoj Giangsu, Ŝandong, Liaŭning, kiuj havas bonan bazon de industrioj. Ankaŭ Tibeto, Hingiang kaj Junnan finis la historion sen industrio de radioriceviloj. Nuntempe ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj produktas radioricevilojn, kaj plejparto de ili provas aŭ povas fari televidilojn. La produktokvantoj de radioriceviloj kaj televidiloj en 1972 kreskis respektive je 12% kaj 100% kompare kun tiuj de 1971; kaj tiuj de januaro ĝis majo ĉi-jare kreskis respektive je 83.2% kaj 88.8% kompare kun tiuj de la sama periodo de la pasinta jaro. Krome la specoj rapide multiĝis, la kvalito rimarkinde boniĝis kaj la memkosto malaltiĝis.

## KONSTRUIĜIS ALIA SINTRO-FABRIKO

La Tria Sintro-fabriko de la Vuhan-a Ferŝtala Kompanio de nia lando estis konstruita kaj komencis produkton. Ĝi havas du produktajn seriojn kaj kvar aglomerilojn. En ĝia konstruo oni aplikis enlandajn maturan teknologion kaj ekipaĵojn, resuminte la sperton akiritan en starigo de la Dua Sintro-fabriko de la kompanio. Nun la maŝinoj kaj ekipaĵoj de la fabriko funkcias regule kaj ĝiaj produktaĵoj atingis projektitajn normojn tiel en kvanto kiel en kvalito.

GIANG FAN:

# Novaĵoj sur la malnova paŝta vojo



*Ŝafaro translokiĝanta al la valo Ili-rivero*

EN printempa komenco, kiam la nordaj stepoj de Tianŝan-montaro de nia lando ankoraŭ portis neĝajn vestojn, ni vizitis la Santaj-Guozigoŭ-an Paŝtan Vojon, unu el la ĉefaj paŝtaj vojoj en Ili-subregiono de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. La printempa prospereco en paŝtado de tiu loko donis al ni profundan impreson, ankoraŭ freŝan eĉ hodiaŭ. Tiam la paŝtistoj estis translokantaj siajn brutarojn de la vintra paŝtejo al la printempa. La gregoj de bovoj, ĉevaloj kaj ŝafoj serpentis kvazaŭ rubandoj sur la Tianŝan-montara paŝta vojo de pli ol cent kilometroj. Sur la larĝa vojo kuris kamionoj, traktoroj kaj ĉevalaj ĉaroj por servo al la paŝtistoj kaj provizo al la brutaroj.

Kiam ni pliprofundiĝis en Tianŝan-montaron laŭ la paŝta vojo, ni propraokule vidis kiel bone la Partio kaj ŝtato zorgas pri la diversnaciaj paŝtistoj. Sur la linio de la vojo pli ol 30 provizoraj stacioj estis starigitaj por servi al la translokado. Vespere, paŝtistoj cirkle sidis en ili kaj babilis pri la bona situacio de la revolucio kaj produktado, manĝante kukon kaj ŝafaĵon kaj trinkante laktan teon. Iuj kazaĥaj paŝtistoj prikantis en akompano de korda muzikilo dombro la socialisman patrolandon kaj la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ. Ĉe la enirejo al Guozigoŭ, kie koncentriĝis pluraj stacioj, sin trovis filmoprojekcia taĉmento kaj danco-kanta trupo por servi al la paŝtistoj. La provizora disaŭdiga stacio disaŭdigis al ili salutan leteron de la gubernia revolucia komitato kaj laŭdindajn aferojn aperintajn en la translokado.

Dum la translokado, hospitaloj de aliaj gubernioj kaj komunumoj aparte alsendis kuracajn laborantojn por kunlabori kun tiuj de la paŝtaj grupoj en prevento kaj kuracado de malsanoj de paŝtistoj. La akuŝontinoj kaj gravaj malsanuloj povis esti tuj senditaj al proksima hospitalo per ambulanco. La maljunuloj kaj infanoj estis transportitaj rekte al la printempa paŝtejo per aŭtoj kaj traktoroj. La migrantaj butikoj vendis silkajn kaj lanajn ŝtofojn, ledbotojn, galoŝojn, ŝtrumpojn, kvadratajn kaptukojn kaj aliajn varojn aparte ŝatatajn de nacimalplimultaj loĝantoj kaj cigaredojn, vinon, teon, sukeron, kukojn ktp. Vendisto diris al ni, ke dekkelke da tiaj butikoj troviĝas sur la paŝta vojo. La paŝtistoj povis aĉeti siajn bezonaĵojn en ili.


La paŝta vojo de Santaj ĝis Guozigoŭ estas en ravino de Tianŝan-montaro. Ĉi tie la klimato estas kaprica kaj la vojo zigzaga. Antaŭ la Liberiĝo, kazaĥaj paŝtistoj rigardis ĝin danĝera. Tiam la translokiĝantaj paŝtistoj pelis tagnokte en neĝoŝtormo brutarojn kun siaj edzino kaj gefiloj; survoje ili

povis preni nur sekan manĝaĵon kaj mildigi sian soifon nur per neĝo. Nokte hurlis malvarmega vento kaj flugis neĝflokoj, ili devis tranokti en ŝirmo de kelkaj truoplenaj feltoj aŭ kaŭri en ŝafaro por sin varmigi. Rememorante pri la pasinta travivaĵo, 68-jara kazaĥa paŝtisto Ajvajlihan diris, ke en iu printempa komenco antaŭ 40 jaroj okazis aparte granda neĝoŝtormo, de tio mortis pli ol 60,000 el ĉ. 100,000 translokiĝantaj brutoj; mortis ankaŭ pli ol 700 el la 1,000 ŝafoj de brutposedanto paŝtataj de li. Multaj paŝtistoj mortis aŭ vundiĝis de la frosto. Parolante pri la hodiaŭo, la maljunulo diris ĝoje: "Post la Liberiĝo, ŝanĝiĝis la socio kaj la paŝta vojo. Dank' al la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ kaj la zorgo de la Partio kaj ŝtato, nun la brutoj havas stalon kaj la homoj domon kaj ni ne plu timas neĝoŝtormojn kiel ajn grandaj ili estas. La du malsamaj socisistemoj portis al ni du tute malsamajn specojn de vivo!"


Cirkulas multaj kortuŝaj rakontoj pri zorgado de kadroj al paŝtistoj kaj interhelpo de la paŝtistoj. En loĝpunkto de la popola komunumo "Ruĝa Flago", ni aŭdis laŭdon de paŝtistoj al kamarado Vu Hiaŭtu, sekretario de la komunuma partia komitato. Vu Hiaŭtu estas han-nacieca kadro, demobilizita de ĈPLA en la jaro 1953. Jam 20 jarojn li fervore servis al la nacimalplimultoj. Dum la translokado li tage peladis brutaron kaj nokte gardostaris kune kun paŝtistoj. Dum translokado de brutaroj en 1972 okazis neĝoŝtormo. Nokton, la ŝafaro de la kazaĥa paŝtisto Kunasbaji estis barata en montoj, liaj vojkondukaj kaproj perdiĝis en la ventego, tial la ŝafoj kunpremiĝis kaj ne volis iri antaŭen. Informiĝinte pri tio, kamarado Vu tuj alvenis. Spite de la neĝoŝtormo li retrovis la perditajn kaprojn, poste li kaj la maljuna paŝtisto kondukis la ŝafaron al la stacio. Kaj nur post finaranĝo de la tranokto de la lasta, ili foriris al aliaj lokoj por rigardi tieajn brutarojn. Ĉifoje kiam la translokado komenciĝis, Vu Hiaŭtu ĉeestis kunvenon en la gubernia urbo. Post la kunveno li tuj rajdis al la translokiĝantaj paŝtistoj por zorgi pri ili.

Ĉi tie, reciprokaj zorgo kaj helpo jam fariĝis kutimo de la diversnaciaj komunumanoj. Dum la vizito ni ofte vidis ke hujoj kaj ujguroj en stacioj preparas manĝaĵojn kaj teon por kazaĥaj paŝtistoj preterpasontaj. La hanaj, hujaj kaj ujguraj membroj de la komunumo Lucaŭgoŭ okupiĝas pri agrikultura produktado kaj ofte sendas lertajn lignaĵistojn al la vintra aŭ printempa paŝtejo por helpe konstrui domojn kaj stalojn por akuŝontaj ŝafinoj. Kaj la kazaĥaj paŝtistoj ĉiujare liveras al la agrikultura komunumo grandan kvanton da fekaĵo de ŝafoj kaj multajn brutojn. La 62-jara kazaĥa paŝtisto Kedeerhan diris emocie: "Prezidanto Maŭ disŝutis semojn de nacia unuiĝo en la landlima regiono de nia socialisma patrolando, ni devas diligente akvumi ilin generacion post generacio por ke ili burĝonu, floru kaj fruktu!"

*ĈPLA-anoj garnizonantaj provizas paŝtistojn per teo en valo.*



*Vojflegisto forigas neĝon per buldozo por paŝtistoj.*




# Nuna Siĉuan-a Trafiko

SIĈUAN-PROVINCO, situanta en la sud-okcidenta parto de nia lando, estas ĉirkaŭata de altaj montoj. En la pasinteco oni povis iri eksteren nur tra la mallarĝaj riveroj en ĝia sudorienta parto kaj vojetoj inter montoj. Li Baj (701-762), antikva poeto de nia lando, plendis: "Malfacilas la siĉuan-aj vojoj pli ol tiu al la ĉielo." Tiun metaforon oni citadis pli ol 1000 jarojn, kaj ĝis la jaro 1949 la tuta Siĉuan havis nur tre malmultajn ŝoseojn.

Dum pli ol 20 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la trafiko de Siĉuan tute ŝanĝiĝis. En 1952 estis finkonstruita la Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo, la unua fervojo de la tuta provinco. En 1957 oni konstruis la Baŭgi-Ĉengdu-an Fervojon (de Baŭgi de Ŝenhi-provinco ĝis Ĉengdu de Siĉuan). Poste estas konstruita ankaŭ la Siĉuan-Gujĝoŭ-a Fervojo (de Ĉongking de Siĉuan-provinco ĝis Gujjang de Gujĝoŭ-provinco) kaj aliaj ĉefaj fervojoj. Nun en la provinco formiĝis reto de ŝoseoj, la riveroj grandaj kaj malgrandaj estas navigeblaj kaj aviadaj linioj interligas la provincon kun ĉiuj aliaj partoj de la lando. Ĉie, ĉu la urboj en kaj ekster la provinco aŭ la foraj montregionoj de la provinco, estas atin-

*Vagonaro kuras tra la Ponto de Janmenba.*



geblaj en ĝusta tempo. Rimarkinda ŝanĝiĝo okazis konforme al la volo de la siĉuan-a popolo.


## LA UNUA FERVOJO

Longe la siĉuan-a popolo deziris konstrui fervojon en sia provinco. Tamen rabe kolektinte grandan sumon da mono de la popolo kun la preteksto de konstruo de fervojo, la putra King-dinastia registaro (1644-1911) vendis la konstruan rajton de la Siĉuan-Vuhan-a Fervojo, kiun oni decidis konstrui, al iu imperiisma lando. Tiam la siĉuan-a popolo lanĉis movadon por defendi la konstruan rajton. Ĝis nun en la Popola Parko de Ĉengdu ankoraŭ restas la monumento de martiroj, kiuj sin oferis en tiu movado. En 1936, la reakcia kuomintanga registaro vendis la konstruan rajton de la Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo al francoj, sed ĝis la jaro 1949, la lastaj metis neniun ŝpalon kaj neniun metron da relo. La espero de la popolo krevis kiel sapveziko.

En 1949, post la venko de la ĉina revolucio en la tuta lando, sub la gvido de la Komunista Partio, la siĉuan-a popolo komencis grandskalan konstruadon de fervojoj. Oni elhakis vojbazon sur krutaĵoj neniam tuŝitaj de hompiedoj, faris stacibazojn per pulvo en profundegaj valoj kaj fosis tunelojn en diversaj rokoj kaj finkonstruis la Ĉengdu-Ĉongking-an Fervojon en 2 jaroj.

La Baŭgi-Ĉengdu-a Fervojo devas trairi Kinling-montaron kaj Gianmen-montregionon, kie ĉie troviĝas altaj klifoj, profundaj valoj kaj rapidaj torentoj. Sed la fervojistoj decidis konstrui tie la fervojon. En la konstruado ili fosis 71,000,000 kubajn metrojn da teraĵo kaj ŝtonoj, starigis preskaŭ 1,000 grandajn kaj malgrandajn pontojn, boris pli ol 300 tunelojn kaj per tio venke plenumis tiun malfacilan konstruon. Iu alia fervojo ankoraŭ devas trairi terenon de antikvaj glaciriveraj restaĵoj, grandajn kaj malgrandajn faŭltojn kaj zonojn de senĉesa defalo. Fervojistoj venkis obstaklojn de koto-ŝtonaj fluoj, karstaj kavernoj, subtera akvo k.s. kaj sukcese konstruis la fervojon. Se vi vojaĝos tie per trajno, vi vidos, ke la trajno iras ofte en tuneloj, iam de tunelo sur ponton kaj alie de ponto en tunelon.

Por senĉese altigi la transportan povon, en la pasintaj pli ol dek jaroj, la Baŭgi-Ĉengdu-a Fervojo estis reformata kun elektrigo kiel la centro Nun sur pli ol 3/4 de la tuta linio jam iras elektraj lokomotivoj, kies tirforto estas $1\frac{1}{3}$ de tiu de vapora lo-



*Ŝipo trapasas Fenghiang-kanjonon.*

komotivo. La rapideco de trajno kaj trapasiga povo de fervojo duobliĝis. Ankaŭ la transporta povo de aliaj fervojoj pliiĝis senĉese. Nun, ĉiutage sur tiuj fervojoj kuras kelkdek pasaĝeraj trajnoj. Iuj rapidaj pasaĝeraj trajnoj povas rekte atingi Pekinon, Ŝanhajon, Hangĝoŭ, Hi-an, Ĝengĝoŭ, Gujjang, Kunming kaj aliajn lokojn.

En transportado en Siĉuan, precipe en ĝiaj foraj montregionoj, ŝoseoj ludas gravan rolon. Post la Liberiĝo, la tiea popolo faris reformon al la malnovaj ŝoseoj kaj samtempe ankaŭ konstruis multajn novajn ŝoseojn. Antaŭ la Liberiĝo, la Ĉengdu-Ĉongking-a Ŝoseo estis grava vojo, sed pro multaj zigzagoj, krutaj deklivoj kaj mallarĝeco de la ŝoseo ofte okazis tragikaj akcidentoj. La aŭtoj devis transpasi riverojn grandajn kaj malgrandajn per pramoj. La distanco inter Ĉengdu kaj Ĉongking estas nur ĉirkaŭ 500 km., tamen eĉ bonŝance oni

devis uzi du tagojn por ĝin traveturi. Se survoje okazis inundo aŭ paneo, oni devis prokrasti plurajn tagojn, tiel ke la veturo per aŭto estis pli malrapida eĉ ol piedirado. Post reformo la ŝoseo tute ŝanĝiĝis. La zigzagoj kaj krutaj deklivoj estis rekonstruitaj, la vojsurfaco rimarkinde larĝiĝis, kaj en la pramejoj estas konstruitaj arkaj ŝtonpontoj aŭ ferbetonaj pontoj, sur kiuj pezŝarĝaj aŭtoj povas trairi. La distancon de Ĉengdu ĝis Ĉongking nun oni povas traveturi en unu tago.


Ĉiuj preskaŭ 200 gubernioj de Siĉuan, escepte de tri montregionaj gubernioj, en kiuj nun ŝoseoj estas konstruataj, jam havas reton de ŝoseoj. En la montoza Giange-gubernio popolamasoj trahakis montojn kaj konstruis pontojn, tiel ke la ŝoseoj interligas ĉiujn komunumojn kaj plejparton de produktaj brigadoj. La malproksimaj montregionoj estas ligitaj kun la urboj.

## ĈUANGIANG-RIVERO JUNGITA

La parto de Jangzi-rivero fluanta de la urbo Jibin en la suda parto de Siĉuan orienten ĝis la urbo Jiĉang de Hubej-provinco estas kutime nomata Ĉuangiang. En la famaj Kjutang-kanjono, Vunhia-kanjono kaj Hiling-kanjono de tiu parto troviĝas multaj rifoj kaj la fluejo estas mallarĝa kaj zigzaga kaj la torento tre rapida, tial oni rigardas la kanjonojn kiel naturajn fortikaĵojn en milito. En la pasinteco, kiam la rivero ŝveliĝis aŭ estis malbona vetero, ŝipoj devis ĉesigi tie sian navigadon, kaj en la sekaj sezonoj nur malgrandaj ŝipoj povis iamaniere trapasi. Tie ofte dronis ŝipoj. En la jaro 1942, unu vaporŝipo renversiĝis kaj dronis, kiam ĝi navigaciis en malprofunda rapidfluejo, ĉiuj pli ol 300 homoj en la ŝipo, inkluzive de la ŝipestro kaj stiristo, mortis en la torento. En pli ol 100 tiaj danĝerejoj okazis ne malmultaj tiaj tragediaj akcidentoj.

Post la Liberiĝo, Ĉuangiang-rivero estas grandskale ordigita. Navigaciaj laboristoj eksplodigis per dinamito dentumajn rifojn, ebenigis kaj profundigis la navigacian linion kaj larĝigis la riveron. Kelkoble-dekkelkoble kreskis la trapasa kapablo de ŝipoj kompare kun tiu de la pasinteco. Dank' al plifortigo de administrado de la navigacia linio,

*Motorboato de naviga signalo kontrolas la navigvojon de Ĉuangiang-rivero.*



plibonigo de ekipaĵoj de direktado kaj instalo de multaj navigaj signaloj en la tuta linio, sekura navigado en nokto jam efektiviĝis en Ĉuangiang-rivero. Tio estis neimagebla en la pasinteco.

La longeco de la branĉoj de Ĉuangiang-rivero estas ĉ. 10,000 km. Post senĉesa ordigo de tiuj riveroj, la navigebla longeco pliiĝis 1.5-oble, kaj la transporta kvanto 12-obliĝis. Sur la bordoj de Gialing, Vugiang kaj aliaj riveroj, tutjare aŭdiĝis en la pasinteco horukado de ŝiptiristoj. Tio donis al preterpasantoj profundan impreson. Nun sur Gialing, Vugiang kaj aliaj ĉefaj riveroj jam iras motorŝipoj. Ŝiptirado jam fariĝis pasintaĵo. Ankaŭ sur aliaj navigaciaj linioj pli kaj pli multaj motorŝipoj estas uzataj.


## DANK' AL DISVOLVIĜO DE TRAFIKO

Oni povas prezenti multe da ekzemploj por montri, ke la disvolviĝo de trafiko en Siĉuan-provinco alportis profundan ŝanĝon al ĝiaj socialisma konstruado kaj popola vivo.

La tieaj plenaĝuloj ankoraŭ memoras, ke antaŭ la Liberiĝo en Siĉuan nur ĉe riveroj troviĝis malgrandaj karbofosejoj, kaj la produktita karbo en malgranda kvanto estis transportita surakve al urboj. Pro malfacila transportado karbominejoj malproksime de rivero ne povis esti ekspluatitaj. Nun iuj grandaj karbominejoj estas jam ekspluatataj kaj mezaj kaj malgrandaj karbominejoj ĉie troviĝas. Kaj ankaŭ aliajn minojn oni ekspluatas unu post alia.

Por loko malfacile atingebla, neimageblas disvolvo de relative granda industrio. En la pasinteco estis kemia kompanio, kiu deziris starigi kemian fabrikon en la urbeto Vutongkiaŭ de suda Siĉuan, sed ne sukcesis, ĉar relative grandaj ekipaĵoj ne povis esti tien transportataj. Antaŭ la funkciado de la Ĉengdu-Ĉongking-a Fervojo, oni devis uzi kelkajn monatojn por transporti 18-tunan maŝinon de Ĉongking al Ĉengdu. Nun multe pli pezaj maŝinpartoj povas esti rapide transportitaj. Post pliboniĝo de la trafikaj kondiĉoj, en Siĉuan-provinco oni paŝon post paŝo starigis grandajn fabrikojn kaj minejojn, kaj mezaj kaj malgrandaj entreprenoj aperis kiel bambuidoj post printempa pluvo. La fame konataj salproduktejoj Vutongkiaŭ kaj Zigong fariĝas urboj de kemia industrio.

Siĉuan-provinco estas riĉa loko, sed en la pasinteco oni ne povis transporti eksteren agrikulturan, lokajn kaj apartajn produktaĵojn de ĝiaj vastaj



*Kamionoj de marko* Flava Rivero *faritaj de Ĉinio transportas varojn al kamparo.*

montregionoj, kaj kamparanoj devis tre malkare vendi ilin al spekulantaj komercistoj kaj de ili aĉeti multkoste industriajn produktaĵojn de ĉiutaga vivo. Ekzemple, salo, la plej ordinara varo, tiam fariĝis raraĵo kaj eĉ kostis po 0.5 kg. dekalitron da rizo en iuj malfacile atingeblaj montregionoj. Multaj ne povis aĉeti salon pro manko de mono kaj suferis de tiroida hipertrofio, pro kio ili eĉ ne povis paroli. Nun, aŭtoj povas atingi vastajn montregionojn. La ŝtato liveras salon kaj diversajn industriajn produktaĵojn bezonatajn de kamparanoj al ĉiuj komunumanoj, kaj produktaj brigadoj kaj kamparanoj povas aĉeti tiujn varojn per sama kosto kiel en urbo. Kaj lokaj produktaĵoj, drogherboj, feloj k.a. de montregionoj jam havas vastan merkaton. Kamparanoj povas per racia kosto vendi ilin al la ŝtato. Samtempe, kamparanoj povas aĉeti de la ŝtato pli kaj pli multe da agrikulturaj maŝinoj, kemia sterko, insekticido k.a. por disvolvi la kolektivan produkton de montregionoj.

ŜUJKING:

# ĈINA PAPERMONO

Mono aperis sekve de la disvolviĝo de varproduktado. En la epoko de Printempo kaj Aŭtuno kaj la epoko de Militantaj Regnoj (722 a. K. - 221 a. K) jam aperis en nia lando metalmono en diversaj formoj kiel ŝpato, glavo, konko, plato ktp. En la deka jarcento en nia lando aperis papermono.

## ĜJAŬZI — LA PLEJ FRUA PAPERMONO DE ĈINIO

La plej frua papermono de nia lando *ĝjaŭzi* aperis je la fino de la deka jarcento en Norda Song-dinastio (960-1127). En la jaro 994 *ĝjaŭzi* aperis inter la popolanoj de Siĉuan. En tiu tempo, agrikulturo kaj metia industrio jam relative multe disvolviĝis en Siĉuan kaj aparte vigla komerco iris en la rikolta sezono de silko, rizo kaj tritiko en ĉiu jaro. Do necesis multe da mono kiel cirkula rimedo kaj pagilo. Tiam en Siĉuan cirkulis feraj moneroj. Ĉiu milo da feraj moneroj en tiu tempo pezis 3.25 kilogramojn kaj estis malfacile por homo porti kvar aŭ kvin mil tiajn monerojn. Tio serioze malhelpis la disvolviĝon de komerco. Tial iuj komercistoj interŝanĝe kolektis ferajn monerojn kontraŭ bilo nomata *ĝjaŭzi* (interŝanĝilo), kiun oni povis uzi kiel pagilon. Tia papermono havis karakteron de kredita valuto.

En la komenca periodo, *ĝjaŭzi*-oj cirkulantaj inter la popolanoj estis emisiitaj de komercistoj meminiciate sen unueca formo. Poste, dekkelkaj riĉaj komercistoj kune emisiis, kun permeso de la loka registaro, *ĝjaŭzi*-ojn en unueca formo kaj sama koloro kaj sur la biletoj estis presitaj bildoj de domoj, arboj, homoj, stampo kaj sekreta sigelo de la emisiinto kaj la valoro de la biletoj estis surskribita laŭ bezono. En la jaro 1023, la ŝtato metis la aferon de *ĝjaŭzi*-o sub sian regadon kaj la registaro starigis specialan institucion por zorgi pri ĝia emisio kaj nur tiam la cirkulado de papermono fariĝis perfekta.

Post kiam la emisiado de *ĝjaŭzi*-o estis metita sub la zorgo de la registaro, ĝia uzado fariĝis deviga en merkato. Unuflanke ĝia cirkulado plivastiĝis, kaj aliflanke la registaro neeviteble ĝin uzis kiel rimedon por ŝtopi financan deficiton. Ekzemple dum la regperiodo de la reĝo Ĵenzong de Song-dinastio (1141-1148), oni dufoje emisiis *ĝjaŭzi*-ojn por militaj elspezoj sen kontanta mono kiel fonduso. En tiu okazo, *ĝjaŭzi*-o ŝanĝiĝis de kredita mono en ŝtatan papermonon.

## ANTIKVA ĈINA PAPERMONO

En la periodo de Suda Song-dinastio (1127-1279) papermono ricevis vastan disvolviĝon. Tiutempe, papermono estis emisiita kaj cirkulanta en plejparto de la lando. Ankaŭ en Gin-dinastio (1115-1279) en Norda Ĉinio cirkulis papermono.

Post kiam Juan-dinastio (1206-1368) unuigis Ĉinion, unueca monsistemo estis starigita kaj papermono estis la fundamenta monsistemo de tiu dinastio. Juan-dinastio heredis la sperton de cirkulado de papermono de Song-dinastio kaj Gin-dinastio kaj sufiĉe perfektigis la cirkulan sistemon de papermono. En la prospera periodo de Juan-dinastio, papermono tiel bone cirkuladis enlande, ke iuj eŭropanoj venintaj al la Oriento estis mirigitaj de tio. La itala turisto Marco Polo rakontis jene pri cirkulado de papermono en Ĉinio: "Komercistoj ĉie uzis papermonon kiel puran oron por donaci, aĉeti varojn kaj rekompenci venditajn varojn." Li eĉ rigardis la emision de papermono kiel "alĥemion" de ĉinaj imperiestroj.

En Ming-dinastio (1368-1644) oni emisiis monbiletojn nur en la komenca periodo, sed pro senĉesa devaluto ili ĉesis cirkuli ĉirkaŭ la jaro 1503. Kaj en King-dinastio (1644-1911) papermono cirkulis nur en tre mallonga tempo.

En antikveco papermono de nia lando estis grava rimedo de feŭdaj regantoj por ekspluati la popolon. Antaŭ la apero de papermono, la feŭdaj

regantoj de diversaj dinastioj jam kutimis uzadi la financan ekspluatan rimedon de devaluto kaj emisio de moneroj super la propra valoro. Post kiam papermono fariĝis ŝtata, ĝi neeviteble estigis inflacion en ĉiuj dinastioj, kaj aparte seriozan inflacion kiam la dinastioj alfrontis falon, kaj la vastaj laborantaj popolamasoj multe suferis de tio.

## MALIGNA INFLACIO DE KUOMINTANGA PAPERMONO

Post la Opia Milito (1840), nia lando fariĝis duonkolonia kaj duonfeŭda socio kaj ankaŭ la cirkulo de mono ricevis brulstampon duonkolonian kaj duonfeŭdan.

La plej frua moderna papermono cirkulanta en Ĉinio estis emisiita de banko fondita de fremdaj komercistoj en Ĉinio. Je la fino de King-dinastio, la unua moderna banko de Ĉinio la Ĉina Komerca Banko fondiĝis kaj emisiis la unuajn modernajn papermonojn de nia lando.

Post la Revolucio de 1911, la Ĉina Banko kaj Komunika Banko estis proklamitaj kiel ŝtataj bankoj kaj ili daŭre emisiis specon de papermono ŝanĝebla kontraŭ metala monero. Dum la tuta regperiodo de la nordaj militaristoj, la grandaj kaj malgandaj militaristoj ĉiuj senbride emisiis papermonon en sia detranĉita regiono, tiel ke la ĉina monsistemo longe estis en ĥaoso kaj la papermono ofte estis en devaluto.

En 1927, Ĉiang Kajŝek perfidis la revolucion kaj starigis kontraŭrevolucian regpotencon de Kuomintango en Nankino. En la sekvinta jaro, ĝi jam fondis la Centran Bankon kaj kaptis la privilegion de emisio de papermono kaj fabrikado de arĝentaj moneroj. En 1935, ĝi faris la tiel nomatan "reformon de leĝa mono", difinante la monbiletojn emisiitajn de la Centra Banko, la Ĉina Banko kaj la Komunika Banko kiel "leĝan monon". En la jaro 1942, la emisia rajto de mono estis koncentrita al la Centra Banko. La sistemo de leĝa mono estas tipa koloniisma monsistemo. La valoro de leĝa mono estis tenata per senlima enaĉetado kaj vendo de fremda valuto. Ĝi dependis unue de britaj sterlingoj kaj poste de usonaj dolaroj. La reformo de leĝa mono ebligis al la kliko de "kvar grandaj familioj" kun Ĉiang Kajŝek kiel la ĉefo pli facile efektivigi sian inflacian politikon por prirabi la popolon. Ĝia rabado estis nekomparebla kun tiuj faritaj de la feŭdaj dinastioj kaj la nordaj militaristoj. Laŭ ciferoj oficiale publikigitaj, la emisiita totala sumo de leĝa papermono estis 1.41 miliardoj da juanoj en junio de 1937 kaj post ok jaroj la sumo atingis 397.8 miliardojn, t.e. kreskis 282-oble. En tiu tempo, la prezoj de varoj en la kuomintanga dua ĉefurbo Ĉongking altiĝis je 1,553-oblo.

En aŭtuno de 1945, post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito, la kuomintanga reakciularo faris kontraŭrevolucian enlandan militon kaj pli intense praktikis politikon de maligna inflacio. Laŭ statistiko, ĝis aŭgusto de 1948, la sumo de emisiita leĝa papermono kreskis de 500 miliardoj ĝis 663,694.6 miliardoj da juanoj, kaj kompare kun tiu de 1937, la sumo kreskis 470,750-oble, kaj en Ŝanhajo la varprezoj kreskis je 34,927,000-oblo kaj la leĝaj monbiletoj efektive fariĝis senvaloraĵo. En tia situacio, la reakcia regpotenco de Kuomintango ludis la artifikon de la t.n. monsistema reformo per "or-juan-a bileto" en aŭgusto de 1948. Ne

*Speco de papermono cirkulanta en la Norda Song-dinastio estas la plej frua el la nun konservataj specimenoj de papermono (Kopio farita per konservata presplato).*



forpasis eĉ unu tuta jaro post la ekemisio de la or-juan-a bileto, la popolo jam tute rifuzis ĝin uzi. En la komenco, ĉiu ora juano valoris 0.005 uncon da oro, poste ĝia valoro falis ĝis 0.000,000,000,6 unco, kaj fine aperis or-juan-a bileto de miliono da juanoj kaj tute senvaloriĝis. En 1937, per 100 juanoj da leĝa mono oni povis aĉeti du bovojn, en 1945 du ovojn, sed en majo de 1949 nur 0.000.000,000, 185 uncon da rizo! La papermono de la kuomintanga reakciularo estis elstara kazo en la monda inflacia historio.

## LA POPOLA PAPERMONO

Post kiam Ĉiang Kajŝek perfidis la revolucion, la ĉina popolo sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ Zedong fondis revoluciajn bazojn kaj ruĝan reĝimon. Dum la diversaj revoluciaj periodoj bankoj fondiĝis en multaj revoluciaj bazoj, kiuj emisiis papermonon kaj iuj el ili fabrikis arĝentajn kaj kuprajn monerojn.

La papermono emisiita en la revoluciaj bazoj estis mono de la popolo mem kaj ludis gravan rolon en la ekonomia konstruado kaj kontraŭmalamika batalo en la revoluciaj bazlokoj. La politiko de emisiado de mono en la revoluciaj bazoj estis ellaboritaj laŭ la fundamenta principo montrita de Prezidanto Maŭ **"disvolvi produktadon kaj garantii provizadon"**. En la jaro 1934, Prezidanto Maŭ jam montris: **"La ŝtata banko devas emisii papermonon fundamente laŭ la bezono de disvolvo de la nacia ekonomio kaj la pure financa bezono devas esti metita en la duan lokon."** Dank' al efektivigo de la instrukcio de Prezidanto Maŭ, sub la malfacilaj kondiĉoj de la jaroj de revolucia milito, la prezoj de nemalmultaj revoluciaj bazoj altiĝis pli malrapide ol tiuj en la regionoj sub la regado de Kuomintango. Ekzemple en la liberigita regiono de Ŝanhi, Hebej, Ŝandong kaj Henan, la prezoj altiĝis nur 26-oble dum la periodo de 1940 ĝis junio de 1945, sed dum la sama periodo la prezoj de Ĉongking altiĝis je pli ol 460-oblo kaj la prezoj de Ŝanhajo okupita de japanaj agresantoj altiĝis je pli ol 7,000-oblo, kaj dum la Liberiga Milito la diferenco estis eĉ pli evidenta.

En preparo por la liberigo de la tuta lando, en la komenco de 1948 oni ekfaris oficialan unuecigon de la mono en ĉiuj liberigitaj regionoj de la tuta lando. En decembro fondiĝis la Ĉina Popola Banko kaj emisiis *jenminbi* (popola mono), tiel ke la unueciga laboro de mono eniris novan stadion. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, en ĉiuj regionoj de la tuta lando, escepte de la liberigota Tajvan-provinco, *jenminbi* estas uzata.

*Ĵenminbi* de nia lando estas socialisma mono memstara, unueca kaj stabila. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ, en marto de 1953 ni jam ŝanĝis la inflacian situacion daŭrintan pli ol 10 jarojn sub la reakcia regado de Kuomintango kaj efektivigis tutlandan stabilecon de financo kaj prezoj dank' al la proletara regpotenco kaj la forto de la socialisma ŝtata ekonomio. Por plie perfektigi kaj firmigi la monsistemon de nia lando, nova *jenminbi* estis emisiita en 1955, kaj ĉiam ĝi restas stabila kaj ludas grandan rolon en la socialisma konstruado de nia lando.




*Monbileto emisiita en la Centra Soveta Regiono de Gianghi-provinco, dum la Dua Enlanda Revolucia Milito*

# La Hodiaŭa Daĝaj



Grandarea konstruado de kampoj sur monto por krei favorajn kondiĉojn por efektivigi agrikulturan mekanikigon kaj irigacion.





rizkampoj





Selektado


La agronomia grupo analizas grundon.







Riĉa rikolto de maizo



Kulturado de bona speco de kotonplantoj



Rikolto



Maturiĝis vinberoj.



Vivecplenaj infanoj de Daĝaj

Daĝaj — nova socialisma montvilaĝo en prospero



ĜANG GUANGBEN kaj LEJ ŜU-JAN:



# Veterana ministo Vu Hjuĝi

*(Raportaĵo)*

EN Tanggiaĝuang-minejo de Kajluan-minejo estas 55-jara Vu Hjuĝi, kiu laboris kiel ministo 35 plenajn jarojn. En la 24 jaroj post la Liberiĝo, ĉiutage li laboris diligente kaj konscience por la popolo en minfosejo. Lia vivo kaj juneco radias lumon kaj varmon por la Partio kaj la popolo kiel brulanta altkvalita karbo.

## I

La 12-a de decembro de 1948 estas neforgesebla tago por Vu Hjuĝi. Tiu tago estis la turnopunkto de la historio de Kajluan-minejo. Je la 11-a horo de tiu tago, en kantado, en la maro da flirtantaj flagoj kaj bolantaj homamasoj, li bonvenigis la sopiratan Ĉinan Popolan Liberigan Armeon. Tuj poste, alte super la ŝaktoframo ekflirtis ruĝa flago. La maljuna Kajluan-minejo komencis novan historian ĉapitron. La vivo disvolvis antaŭ li novan perspektivon. Sinforgese li laboradis por restarigo de la nacia ekonomio.

Iun printempan tagon de 1951, kiam Vu Hjuĝi finis sian deĵoron kaj estis iranta al la vestoŝanĝejo, galeria estro de la minejo Maljuna Vang ĝoje rapidis al li kaj diris: "Maljuna Vu, la partia filio decidis, ke morgaŭ vi partoprenu en la kurso por lerni manipuladon de karbotranĉa maŝino."

"Manipuli maŝinon?" la koro de Vu Hjuĝi ekbatadis intense. Li sentis kaj ĝojon kaj skrupulon. Li etendis al Maljuna Vang siajn grandajn manojn plene nigrigitajn de karbopulvoro kaj diris: "Maljuna Vang, ĉu tiaj manoj taŭgas por tio?"

"Jes, taŭgas!" ankaŭ Maljuna Vang etendis siajn same grandajn manojn kaj firme premis al Vu la manojn kaj diris: "Ĉu vi ankoraŭ memoras la politikan lecionon donitan de la partia reprezentanto? Ĉu la tuta mondo ne estas kreita de ni laborantaj popolanoj! Hodiaŭ ni fariĝis la mastroj de la lando kaj la minejoj fariĝis popolaj minejoj, do ni estas mastroj de la minejoj. Tio ke la Partio alvokis nin bone administri kaj konstrui la minejojn, manifestis la fidon de la Partio al ni. Maljuna Vu, ne vanigu la esperon de la Partio kaj bone laboru kiel mastro."

Tiujn vortojn iam diris la partia reprezentanto. Nun Vu Hjuĝi sentis ilin same intimaj kaj emociaj kiel antaŭe, kiam Maljuna Vang denove menciis ilin. Li direktis la rigardon foren: Tie staras kvar gigantaj vinĉturoj en vico kaj la kabloradoj flugrapide turniĝas. Ruĝa flago flirtas en la vento kaj impresas kvazaŭ brulanta torĉo. "Mastro de la minejoj!" Vu Hjuĝi ripetade maĉis la vorton kaj larmis pro emociiĝo.

Tiunokte Vu Hjuĝi maldormis ree kaj ree turniĝante en la lito. Luna lumo blankigis la fenestrojn kaj plankon. Ankoraŭ ne tagiĝis. Li neniel povis daŭre kuŝi sur la lito kaj eliris al la kursejo. Li faris balaadon en kaj ekster la kursejo kaj poste sidiĝis ĉe la karbotranĉa maŝino. Li pririgardis, palpadis kaj viŝis la maŝinon brile pura.

Kiel malfacile estis por neklerigita homo lerte uzi tian maŝinon. La strukturo, la manipula metodo, la komplikaj maŝinpecoj kaj cirkvito de la maŝino konfuzis lin. Por konkeri la teknikon kaj teorion Vu Hjuĝi diligente lernis legadon. Ĉiutage, reveninte hejmen de la kurso, li tuj komencis ekzercadon de skribado kaj legado. Vidinte lin

ŝviti kun plumo en la mano, lia edzino admonis lin lerni ne tiel urĝe. Sed li respondis: "La minejo progresas ĉiutage, kiel mi povus lerni neurĝe?"

Kia malfacilo povas bari tian maljunan laboriston forskuintan la ĉenon de la malnova socio?

En praktika manipulado en fosejo, karbotranĉistoj pacience instruis lin. En la unua fojo, la karbotranĉa maŝino ne obeis lin kiel sovaĝa bovo. Maljuna Vu tamen ne deprimiĝis. Li ripetade lernis kaj sin ekzercis... kaj fine la "sovaĝa bovo" estis dresita. Ĝi ĝoje muĝas kaj glate funkcias. La detranĉitaj karbopecoj falas kiel kaskado kaj fluas en karbokonservujojn laŭ la senfina ĉeno. Kaj poste ili estas levitaj el la ŝakto kaj transportitaj al diversaj lokoj de la lando.

Kun la ĝojo esti mastro de la minejo, Vu Hjuĝi laboras tutenergie en la minejo kaj famiĝis kiel "senripoza homo". En manipulado de la maŝino, se li renkontis faŭlton, li tuj ekprenis elektran borilon por fari truojn. Kie troviĝas dika karbotavolo, tien la manipulistoj devas iri. Tial Maljuna Vu laboris kun sia ŝatata karbotranĉa maŝino en ĉiuj galerioj de Tanggiaĝuang-minejo. Lia diligenta laboro estis laŭdata de la vastaj laboristaj amasoj. Poste Vu Hjuĝi fariĝis maŝinriparisto. Finplenuminte sian laboron li ĉiam petas de sia estro plian taskon. Ĉiutage, irante al laboro li ĉiam kunportas saketon, en kiun li metis ĉiun forĵetitan ŝraŭbon, stifton, difektitan dentotranĉilon k.s. kiujn li kolektis kaj frote purigis. Li ofte diris: "Ni estas mastroj de la lando kaj devas konsideri ĉion en la utilo de la lando. Disipa stilo estas maldeca."

## II

Oni diris, ke Vu Hjuĝi senĉese laboras, kiel senhalte turniĝanta kablorado. Dum la pli ol 8,700 tagoj kaj noktoj en la pasintaj 24 jaroj aperis diversaj aferoj, sed Vu Hjuĝi neniun fojon malfruiĝis kaj neniun tagon forestis de sia laboro ĉu en pluvo kaj vento, aŭ en prujno kaj neĝo.

Ĉu por Vu Hjuĝi ne estis urĝe farenda afero en la hejmo? Jes, estis.

En iu somero, lia fileto subite malsaniĝis kaj febris je 40 gradoj. Vu Hjuĝi portis la knabon en hospitalon kaj faris necesan aranĝon. Li rigardis la brakhorloĝon kaj trovis, ke baldaŭ estos lia deĵortempo. Li volis tuj iri al la laboro, sed kuracisto zorge diris al li: "Maljuna Vu, tiel grave la knabo malsanas, vi do restu ĉi tie." Vu Hjuĝi kapskuis: "Mi ne bezonas maltrankviliĝi, ĉar la knabo estas sub via flegado. Nun la konstruado de la lando urĝe bezonas karbon kaj mi sentos maltrankvilon se mi ne iros al laboro."

Maljuna Vu estas firmvola homo, ke vundetoj aŭ malsanetoj ne povas haltigi lin en laboro. Foje, lia dikfingro estis vundita. Kamaradoj admonis lin ripozi, sed li daŭre laboradis pansinte la fingron per gazo. Post lia deĵoro kuracisto kunkudris al li la vundlipojn kaj konsilis lin ripozi kaj atentigis lin pri infekto. Sed li diris: "Trankvilu, doktoro, ĝi ne infektiĝos." Li elpoŝigis likimunan saketon uzitan por pakado de dinamito kaj envolvis per ĝi la fingron. Li diris al la kuracisto: "Jen, tre bone, ĉu ne?" La kuracisto nur kapskuis kaj nenion diris. Kion li povus diri antaŭ la maljuna ministo tutanime zorganta pri la minejo?

La 24 Printempajn Festojn post la fondiĝo de la nova Ĉinio Vu Hjuĝi pasigis en produktado.

Ĉu li kaj liaj familianoj ne volis kune pasigi Printempan Feston? Jes, ili volis. Antaŭ iu printempa festo, lia edzino jam faris plenan preparon. Antaŭvespere de la festo ŝi sidis ĉe la tableto kaj zorge faris *ĝiaŭzi*-ojn (farĉita farunaĵo kuirita en akvo aŭ vaporumita, tre ŝatata de norduloj de Ĉinio) kaj metis ilin bonorde vicon post vico sur vaporumilajn bretojn. Ektintadis biciklo — revenis ŝia filo, fosisto en ŝakto. Li kun ĝojo malfermis la kalendaron kaj vidis, ke la Printempa Festo ĉijare estos ĵaŭdo. Li ĝoje kriis al la patrino: "Panjo, morgaŭ ĝuste estos ripoztago por mi kaj paĉjo. Ĉifoje ni povos kune pasigi la Printempan Feston!" Post nelonge Vu Hjuĝi revenis. Je la enpaŝo en la ĉambron li jam kriis al siaj edzino kaj filo: "Nu, ĉivespere ni kune celebru la Feston." La tableto estis plene kovrata de bongustaĵoj kaj kruĉo da sorga brando tre ŝatata de Vu Hjuĝi. Poste alportiĝis varmaj kaj bonodoraj *ĝiaŭzi*-oj. La filo ĝoje diris: "Paĉjo, morgaŭ estos ĵaŭdo kaj ni ambaŭ havos ripoztagon." "Nu, kion vi volas?" Drinkante, la patro karese rigardis al la filo. "Ni kune iru al kinejo kaj poste..." La filo ja ne sciis, kion pensis la patro, kiu dronis en meditado pri la amara pasinteco: En vintro de 1938, la malfacila vivo devigis lin forlasi la hejmvilaĝon. Li venis al Kajluan-minejo kaj fariĝis ministo. La korŝira ploro de la patrino ĝis nun ankoraŭ sonas ĉe liaj oreloj. Li klare memoras, ke li foje estis kompakte subpremita de falintaj karboj, lia kapo sangis vundite de ŝtono kaj la laborkontrolisto kruele vipis lin... Aŭdinte la tragikajn pasintaĵojn de la patro la filo ploris. Li forte pugnigis la manojn pro indigno. Poste Maljuna Vu rakontis al la filo pri tio, kiel la

ruĝa flago flirtis en la minejo; en kia emociiĝo li aŭskultis la eksplikadon de la partia reprezentanto, ke ministoj devas esti mastroj de la minejoj; kiel li skribis per tremanta mano la ĵuron "batali por komunismo dum la tuta vivo" en la petskribo por partianiĝo... La filo forviŝis la larmojn kaj faris decidon esti bona ministo. Vu Hjuĝi diris: "Dank' al la gvido de la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ, nia vivo pli kaj pli boniĝas. Ni ĉiam devas teni en la koro la konstruadon de la patrio kaj la bezonon de la popolo, devas klopodi por produkti pli multe da karbo por la Partio kaj la lando, por la varmo de la tuta popolo."

En la sekvinta frua mateno, kiam el iuj fenestroj ankoraŭ penetriĝis la lumo de Printempa Festo kaj en la aero krakis novjaraj petardoj, la filo vekis la patron. La patro kaj la filo iris ŝultron ĉe ŝultro al la minejo. Ili bonvenigis la novan printempon per laboro.

## III

Estis ĉarma mineja mateno. La suno origis la radojn sur la altaj ŝaktoframoj. La kaĝoj leviĝis kaj malleviĝis. Lokomotivo gaje fajfis. Ministoj iris disen al laboro... Ĉio manifestis prosperon. Vu Hjuĝi kaj junaj ministoj iris interparolante. Iliaj ministaj bluzoj estis puraj kaj la nigraj ministaj kaskoj estis brile viŝitaj. Ilia naiva vizaĝo indikis, ke ili ne multe spertis hardadon. Rigardante tiujn junulojn, Vu Hjuĝi kontente ridetis. Tamen leviĝis en li la penso: Eduki tiujn junulojn per la revolucia spirito de la laboristaro kaj fari ilin pli fortikaj por ke ili estu kompetentaj pri la revolucia tasko, ne estas bagatelo de eduko de kelkaj junaj laboristoj sed grava afero koncernanta al la problemo ĉu la revolucia afero de la proletaro havos senfinajn generaciojn da daŭrigantoj.

Vu Hjuĝi fariĝis politika direktanto de filio de la Komunisma Junulara Ligo. De tiam oni ofte vidas lin lernanta kaj interparolanta kun junuloj en kunvenoj de Junulara Ligo. Li dolore rakontis al ili la tragikan vivon de ministoj en la malnova socio, ke la ministoj devis fosi karbon riskante sian vivon en la galerioj similaj al infero. Maljuna Vu ŝatas kunesti kun junuloj. Li bone sciis, kiu havis aflikton aŭ renkontis malfacilojn en laboro, kaj antaŭ ol tiu eldiris tion, li jam venis al li por helpo. La junuloj diris emocie: "Majstro Vu povas travidi nian penson."

Foje, materialportisto Malgranda Gu iris kun klinita kapo piedbatante ŝtonetojn sur la vojo.



Subite li sentis, ke varma mano frapis al li la ŝultron. Li returnis la kapon kaj vidis majstron Vu. Maljuna Vu sincere diris: "Malgranda Gu, eble vi ne ŝatas la laboron de materialportisto?" Malgranda Gu silentis. Li daŭre diris intime al li: "Malgranda Gu, ĉu truado aŭ dinamitado, ĉu barakokonstruado aŭ materialtransportado, ĉiuj laborspecoj estas bezonataj de la revolucio. Nur la revolucio elektu nin por laboroj, sed ne ni mem elektu laboron laŭplaĉe. Ni ne devas elekti por ni nur facilajn laborojn!" Post kelkaj tagoj Maljuna Vu refoje venigis Malgrandan Gu kaj rakontis al li pri la tragika vivo de la laboranta popolo antaŭ la Liberiĝo. Malgranda Gu emociiĝis ĝis larmoj. En la tria fojo de renkontiĝo kun majstro Vu, Malgranda Gu iris renkonte al li kaj diris kun rideto: "Majstro Vu, observu mian praktikan laboron." Vere kiel dirite, Malgranda Gu laboras kun plena entuziasmo.

En iu pluvega tago, rigardante la seninterrompajn pluvfadenojn ekster la fenestro, Liu Enjoŭ, helpanto de Vu Hjuĝi, diris al sia edzino: "Falas tia pluvego, majstro Vu eble ne venos." Sed antaŭ ol li finis sian frazon, la pordo estis malfermita. Vu Hjuĝi enpaŝis en pluvmantelo, de kiu pluvakvo falis kiel fadeno. Liu Enjoŭ diris kortuŝite: "Majstro Vu, spite al tia pluvego vi piediris 2-3 kilome-

trojn por helpi min lerni. Ni ja povus lerni post kelkaj tagoj." Sed Maljuna Vu diris serioze: "Tio ne decas. Lerno povus esti aranĝita en alia tempo, sed se oni ekŝanceliĝus je la decido, tio estus malfacile riparebla." Ĉar tiu tago estis lernotempo de Vu Hjuĝi kaj Liu Enjoŭ.

Kiam Liu Enjoŭ estis ĵus veninta al la maŝino de Vu Hjuĝi kiel lia helpanto, Maljuna Vu sentis elkoran ĝojon trovinte, ke li laboris energie kaj lerte. Sed post nelonge, li trovis, ke Liu Enjoŭ studis politikan teorion ne tre aktive. Li faris multfojajn konversaciojn kun Liu kaj la lasta eldiris sian opinion. Li diris, ke por laboristo sufiĉas bona produktado kaj krome li ne scipovis legi. Vu Hjuĝi sincere diris al li: "Enjoŭ, ni laboristoj ne devas droni en produktado kaj forgesi la neŝanceleblan ĝustan direkton politikan! Scipovon de legado oni povos akiri per lernado. Se vi estas persistema, ĉie vi trovos instruistojn." En la sama tago ili faris decidon kune studi verkojn de Prezidanto Maŭ por helpi unu la alian. Ilia kuna studo daŭris 4 jarojn sen interrompo. Hodiaŭ ili devis studi la verkon *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo*. Leginte paragrafojn, Liu Enjoŭ levis la kapon kaj ekridis fikse rigardante Maljunan Vu. Maljuna Vu estis konfuzita de lia rido kaj demandis: "Pro kio vi ridas?" Liu Enjoŭ respondis: "Vi helpas min studi la verkon *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo*, sed vi mem ja estas Malsaĝa Avo, kiu timas nenian malfacilon." Maljuna Vu tuj skuis la manon: "Ne, longa distanco restas inter mi kaj la Malsaĝa Avo. Ni ĉiuj devas diligente lerni de li!" Dank' al lia helpo, Liu Enjoŭ fariĝis glora komunisto kaj aktivulo en studo de marksismoleninismo kaj verkoj de Prezidanto Maŭ.

Printempa zefiro karesas buntajn florojn. Nova printempo venis al la minejo. Nova generacio de ministoj kreskas. Vidante la junulojn lerte manipulantajn karbotranĉajn maŝinojn, Maljuna Vu sentis ĝojon en la koro. Iun tagon li venis al gvidanto de eksplutatejo kaj diris: "Lasu min labori kiel trabizisto en galerio." La gvidanto admonis lin: "Maljuna Vu, la aĝo estas senindulga kaj la laboro de trabizisto estas tro peza por vi. Vi daŭre manipulu la maŝinon." Ridante Vu Hjuĝi etendis sian trabsimilan brakon kaj diris: "Vidu, ankoraŭ plurajn jarojn mi povos labori. Inter trabizistoj estas multaj junuloj kiuj ne havas sufiĉan sperton. Kunestante kun ili mi povos pli multe zorgi pri ili." Liaj vortoj estas tre firmdecidaj.

En la sekvinta tago, en la fosejo venis nova trabizisto, la avangarda komunisto Vu Hjuĝi.

## Kurantaj Aferoj

### NOVAJ SUKCESOJ EN ESPLORADO DE GLACIRIVERO, FROSTIĜINTA TERO KAJ DEZERTO

Lastajare ĉ. 200 sciencaj esploraj laborantoj de la Instituto pri Glacirivero, Frostiĝinta Tero kaj Dezerto de la Ĉina Akademio de Sciencoj iris al diversaj lokoj por entrepreni sciencajn esplorojn kune kun la amasoj de laboristoj kaj kamparanoj. La instituto sume plenumis 15 esplorajn temojn, verkis pli ol 20 disertaĵojn, tradukis scienc-teknikajn materialojn kun miliono da ideografiaĵoj kaj kompilis nombron da popularaj sciencaj legaĵoj. Ekzemple, ili komencis konstruon por preventi kaj jungi ter-ŝtonan fluon. En dezertaj regionoj ili trovis kaj kolektis pli ol 300 speciojn da drogherboj, pri kiuj ili kompilis broŝuron, tio tre utilas al disvolvo kaj utiligo de la plantaĵoj de dezertaj regionoj. Ili ankaŭ profundiĝis en iun dezerton kaj pretigis utilajn materialojn por konstrui fervojon. La sciencaj laborantoj ankoraŭ faris plian esploradon al la dezertoj Badangilin kaj Tenggeli kaj ankaŭ al iu glaci-monto por pluapaŝe koni Himalajon.

### NOVE ELDONITAJ FREMDLANDAJ LITERATURAĴOJ

Lastatempe la Eldonejo de Popola Literaturo eldonis nombron da fremdlandaj literaturaĵoj. La romanoj de Gorkij *Patrino* kaj *Infaneco* jam eldoniĝis, kaj liaj verkoj *En la Homaro* kaj *Miaj Universitatoj* baldaŭ estos eldonitaj. Inter la eldonaĵoj troviĝas ankaŭ la represita romano de Fadeev *Frakaso* kiu estis tradukita de Sinjoro Lusin, kaj nove tradukita *Vilaĝo Numa Jiri*, verko de la japana revolucia verkisto Kobajaŝi Takiĵi. La eldonejo eldonis ankaŭ la nuntempajn literaturajn verkojn *Novelaro de Sud-Vjetnamio, Novelaro de Albanio* kaj *Novelaro de Vjetnamio.*

Post la Kurso

# ĈIELARKO

LA sekvantan tagon, post kiam mi revenis al la hejmvilaĝo por pasigi miajn feriojn, mi laboris kune kun komunumanoj en kampo. En laborpaŭzo mia filineto Jinnjo kuris al ni kaj demandis min ridetante: "Paĉjo, ĉu vi ŝatas rigardi ĉielarkon?"

Mi ekrigardis ŝiajn vangojn similajn al ruĝaj pomoj kaj diris senpripense:

"Jes, mi ŝatas."

"Do iru kun mi por tion rigardi." Jinnjo tuj ekiris tirante al mi la manon. Ĉe nia loko longe ne pluvis. Mi rigardis al la ĉielo kaj vidis neniun nubon. Kiel povus estiĝi ĉielarko? Vidinte mian hezitan mienon, Jinnjo malpacienciĝis:

"Paĉjo, mi ne trompas vin."

"Kie do estas la ĉielarko?"

"Tie, post la Orienta Monto. Iru! Ni vidos ĝin sur la montosupro."

Mi kaj Jinnjo iris supren laŭ la larĝa vojo serpentumanta ĉirkaŭ montoj. Ambaŭflanke de la vojo estis ŝtuparkampoj. Klara akvo fluas tra zigzagaj kanaloj en tritikajn kampojn. Abeloj okupiĝas en oraj kolzkampoj. Fruktarboj eligis verdetajn ŝosojn. Mantraktoroj gaje bruas en kampoj... Kiel bela estas hodiaŭ la hejmloko!

La vidaĵo rememorigis al mi la pasintecon de mia hejmvilaĝo: Antaŭ la Liberiĝo, mia hejmloko estis tre malriĉa montvilaĝo. En sekegeco, la montoj fariĝis kalvaj kaj en pluvabundaj jaroj torentaj montfluoj ofte forportis grundon.


Sed, post la Liberiĝo, sub la gvido de la Kompartio, la vilaĝanoj persistis ĉe la principo "apogi sin sur la propraj fortoj kaj peneme lukti kontraŭ malfaciloj", ŝanĝis ĝian fizionomion kaj akiris abundan rikolton en la lastaj sinsekvaj jaroj.

Survoje mi memoris la diron de mia edzino en la lasta vespero: En la pasinta jaro, la vilaĝanoj konstruis akvorezervejon en la Orienta Montvalo kaj jungis Hiaŭĉun-riveron. La akvo estis kondukata al montoj por irigacii ŝtuparkampojn. Krome, oni konstruis malgrandan hidroelektrejon, kiu liveras elektran energion ne nur al nia vilaĝo, sed ankaŭ al la proksima nove konstruita karbominejo.

Tion rememorante mi jam atingis la montosupron. Antaŭ ol mi pririgardis, Jinnjo jam ekkriis: "Paĉjo, rigardu, ĉu tio ne estas ĉielarko? Ho, kiel bela!"

Mi turnis la rigardon al la montrita direkto kaj vidis: La akvo torentanta ĉe la elfluejo de la elektrejo antaŭ la digo de la akvorezervejo kaj kontraŭ la pumpstacio ŝaŭme ondegis ŝutante akverojn en la aeron. La muĝanta kaj fluge falanta akvo reflektis la brilajn sunradiojn kaj estigis sepkoloran ĉielarkon.

Ho, kiel brila ĉielarko! En la fono de la verdaj montoj, lazura ĉielo kaj ondetanta akvorezervejo, la ĉielarko similis al helkolora, bunta silka rubando. Tamen ĝi estis pli bela kaj pli ĉarma ol ĉielarko post pluvo!



ĜU KEĜEN:

# Iom pri la evoluo de la klimato en Ĉinio dum la pasintaj 5,000 jaroj

EN la ĉina historia literaturo abundas meteologiaj kaj fenologiaj notoj pri la pasinteco. En tiu ĉi artikolo mi faros skizon pri la ŝanĝiĝo de la klimato en Ĉinio dum la pasintaj 5,000 jaroj, laŭ unuapaŝa analizo pri disponebla materialo ĉe mi.

En la musona regiono de Orienta Azio, la ŝanĝiĝo de precipitakva kvanto ofte estas ekstrema, tial ĝi ne taŭgas por esti uzata kiel indikilo de klimato, dum la ŝanĝiĝo de temperaturo estas relative regula kaj en vintro kaj printempo jam povas influi la kreskadon de agrikulturaj plantoj. La vintra temperaturo de nia lando estas regata ĉefe de la malvarma aerfluo de Siberio, kaj ĝia ŝanĝiĝo estas relative unueca. Tial en tiu ĉi artikolo vintra temperaturo estas prenata kiel indikilo de la ŝanĝiĝo de la ĉina klimato.

La lastaj 5,000 jaroj povas esti dividitaj en jenaj kvar periodoj laŭ la malsameco de la uzitaj materialoj por tiu ĉi studo.


## ARKEOLOGIA PERIODO (3000-1100 a. K.)

La postrestaĵo de Banpo-vilaĝo (historia postrestaĵo de Jangŝaŭ-kulturo antaŭ 5,600-6,080 jaroj) elfosita en la ĉirkaŭaĵo de Hi-an kaj restaĵo de Ŝang-dinastia urbo (ĉ. 1,400-1,100 a.K.) elfosita ĉe Anjang de Henan-provinco montras, ke inter la tiamaj ĉasaĵoj troviĝis tropikaj kaj subtropikaj bestoj kiaj bambu-ratoj (*Rhizomys sinensis*), moskocervoj kaj bubaloj, kaj tamen hodiaŭ en Hi-an kaj Anjang jam ne plu ekzistas tiaj bestoj. Krome, el tekstoj gravuritaj sur ostoj kaj testudaj ŝeloj de Ŝang-dinastio oni povas scii, ke la Anjang-anoj en tiu tempo kulturis rizon je unu monato pli frue ol nun. Inter historiaj kulturaj restaĵoj elterigitaj en Ŝandong-provinco oni trovis pecon da karbigita bambuo kaj ankaŭ iuj fajencaĵoj havas formon de bambupeco. Tio montras, ke en la malfrua periodo de neolito bambuo kreskis en la baseno de la Flava Rivero etendiĝanta ĝis la orienta marbordo. Laŭ la diritaj faktoj kaj la norda limo de la bambu-kreska regiono en la pasintaj 5,000 jaroj, oni povas diri ke la periodo inter Jangŝaŭ-kulturo (antaŭ 5,000 jaroj) kaj Ŝang-dinastio (antaŭ 3,000 jaroj) estis periodo de varmeta klimato en Ĉinio kun temperaturo je ĉ. 2° C pli alta ol la nuna meznombra jara temperaturo, kaj ĝia meznombra temperaturo de la unua monato lunkalendara estis pli alta je 3°-5°C ol la nuna.

## FENOLOGIA PERIODO (1100 a. K.-1400 p. K.)

Oni povas diri, ke fenologio estas la meteologio kaj klimatologio en la tempo kiam oni ankoraŭ ne havis mezurajn instrumentojn por tia esploro. En antikveco, niaj popolanoj ofte konstatis la ŝanĝojn de vetero en unu jaro per fenologiaj fenomenoj kiaj apero de prujno, neĝado, degelo de glacio, burĝoniĝo de arboj, florado, fruktado, alveno kaj forflugo de migraj birdoj. En la 11-a jarcento antaŭ Kristnasko nia laboranta popolo jam kreis tian esploradon kaj akumulis riĉan materialon fenologian de tri mil jaroj.

En dokumentoj de la komenca periodo de Ĝoŭ-dinastio datiĝinta de 1066 a.K., la ĉinaj ideografiaĵoj signifantaj vestojn, vazojn, librojn, meblojn



*Ĝu Keĝen, vicestro de la Ĉina Akademio de Sciencoj*

kaj muzikilojn enhavas figuraĵon de bambuo kiel la supran parton. Tio montras, ke tiuj objektoj tiam estis faritaj el bambuo. El tio oni povas diveni, ke tiam en la baseno de la Flava Rivero vaste kreskis bambuo, sed nun ĝi jam ne kreskas tie. La varmeta klimato en la komenca periodo de Ĝoŭ-dinastio baldaŭ malboniĝis. Kaj Hangiang-rivero, kiu troviĝas sude de la Flava Rivero, dufoje glaciiĝis en 903 kaj 897 a.K. Sed poste en la Epoko de Printempo kaj Aŭtuno (770-481 a.K.) la klimato denove varmiĝis. La historia verko *Zuo Ĝuan* diras, ke en la regno Lu (nun Ŝandong) oni ne povis trovi glacion en vintro. En la meza periodo de Ĝoŭ-dinastio, umearboj kreskis ĉie en la malsupra baseno de la Flava Rivero. Kaj tiutempe ankaŭ sur Ĝongnan-monto sude de la urbo Hi-an kreskis umearboj, sed nun tie jam ne troviĝas tiaj arboj ĉu sovaĝaj aŭ plantitaj. En la Epoko de Militantaj Regnoj kaj la dinastioj Kin kaj Han, la klimato plue varmiĝis. Ĝang Biaŭ de la komenca periodo de King-dinastio studis fenologian materialon de Kin-dinastio kaj opiniis, ke la fenologiaj fenomenoj fru-printempaj de Kin-dinastio estis pli fruaj je 3 semajnoj ol tiuj de la komenca periodo de King-dinastio. Sima Kian de Han-dinastio priskribis la kreskajn areojn de la tiamaj ekonomiaj plantoj kiaj mandarin-arbo, morusarbo, bambuo kaj lak-arbo kaj montris, ke la norda limo de la areo de tiuj subtropikaj plantoj lokiĝis pli norde ol la nunaj.

En la periodo de la Orienta Han-dinastio, t.e. la komenca periodo post la Kristnasko, la klimato de nia lando tendencis al malvarmiĝo. Oni havis plurajn frostajn vintrojn kaj en la ĉefurbo Luojang, prujno kaj neĝo aperis eĉ en malfrua printempo. Tamen la frosto daŭris nelonge. Tiutempe mandarin-arboj kaj oranĝ-arboj tre vaste kreskis en la suda parto de Henan-provinco. Kaj en la Epoko de la Tri Regnoj, Caŭ Caŭ (155-220 p.K.) plantis mandarin-arbon ĉe Tongkjuetaj en la nuna Hebej-provinco, tamen ĝi jam ne povis fruktodoni. En la jaro 228, kiam Caŭ Pej supervidis manovradon de soldatoj, Huajhe-rivero subite glaciiĝis pro frosto kaj la manovrado devis esti ĉesigita. Tiam la klimato estis pli malvarma ol nun. La malvarmiĝado daŭris ĝis la posta duono de la tria jarcento. En la Epoko de la Suda kaj Norda Dinastioj (420-579 p.K.), sur la monto Fuĝoŭ de Nankino troviĝis domo por konservi glacion, do la tiama vintro de Nankino devis esti pli malvarma je 2° C ol la nuna por ke glacio aperu. Laŭ la historia verko *Zi Ĝi Tong Ĝian* de Sima Guang, en la komenca periodo de la 4-a jarcento, en tri sinsekvaj vintroj ĉ. la jaro 336 glaciiĝis Bohaj-markolo en la etendaĵo de Ĉangli ĝis Jingkoŭ kaj miloj da soldatoj povis marŝi sur la glacio.

En la meza parto de la 7-a jarcento, t.e. la dinastioj Suj kaj Tang (581-907), la klimato varmiĝis. En la vintroj de la jaroj 650, 669 kaj 678, en la ĉefurbo Ĉang-an estis nek glacio nek neĝo. En la komenca periodo de la oka jarcento kaj la komenca kaj meza periodoj de la naŭa jarcento, en la imperiestra palaco de Hi-an kaj Kjuĉi en ĝia suda antaŭurbo kreskis umearboj. Kaj krome tie kreskis ankaŭ mandarinarboj, kaj tiuj arboj eĉ fruktodonis. Mandarinarbo povas rezisti nur kontraŭ malvarmo de -8° C, sed nun preskaŭ ĉiujare la plej malalta temperaturo de tiu urbo estas sub -8° C. En la komenca periodo de la 11-a jarcento, en norda Ĉinio jam ne plu kreskis umearboj. En la komenca periodo de la 12-a jarcento, la klimato de Ĉinio malvarmiĝis pli akute. En la jaro 1111, glaciiĝis la tuta lago Tajhu sude de Jangzi-rivero, en ĝia malsupra baseno, kaj veturiloj povis trafiki sur la glacio. La mandarinarboj sur Dongting-monto en Tajhu frostmortis. En Hangĝoŭ neĝis multfoje kaj eĉ en malfrua printempo. En la periodo 1153-1155, la Suda Kanalo en la ĉirkaŭaĵo de Suĝoŭ glaciiĝis en vintro.

En oktobro de 1170, ĉie en la Okcidenta Montaro de Pekino estis neĝo, dum nun tre malofta estas tia fenomeno.

Tuj post la fino de la 12-a jarcento, la vintroj de Hangĝoŭ komencis revarmiĝi. En la jaroj 1200, 1213, 1216 kaj 1220 estis nek glacio nek neĝo en Hangĝoŭ. En tiu periodo, la abrikotarboj floris en la sama tempo kiel nun. La relative varma periodo en la komenca kaj meza partoj de la 13-a jarcento estis mallonga kaj baldaŭ denove aperis frostaj vintroj. En la jaroj 1329 kaj 1353, en la lago Tajhu aperis glacitavolo dika je pluraj futoj kaj denove frostomortis mandarinarboj. En novembro de 1351, glaciaj blokoj jam aperis en la Flava Rivero en Ŝandong-provinco, dum en la lastaj jaroj glaciaj blokoj aperas pli malfrue en decembro en la Flava Rivero en Henan kaj Ŝandong. Tio montras, ke la klimato en la 14-a jarcento estis pli malvarma ol tiu en la 13-a jarcento kaj nun.

En 1221, la fama taoisto Kiu Ĉugi vojaĝis de Pekino al Meza Azio por vidi Ĝingis-Ĥanon. Kiam li preterpasis la lagon Sajlimu de Hingiang, la montoj ĉirkaŭ la lago estis kovrataj de neĝo. Nun sur tiuj montoj jam ne plu estas neĝo. La tieaj montpintoj altis ĉ. 3,500 metrojn, do tiam la neĝ-linio estis sub 3,500 metroj. Nun, la neĝnivelo en tiu parto de Tianŝan-montaro estas inter 3,700 kaj 4,200 metroj. Sur la Rusa Ebenaĵo en Eŭropo la malvarma periodo komenciĝis en ĉ. 1350; en la Germana kaj Aŭstra Regionoj, la klimato evidente malboniĝis ekde 1429-1465; en Anglio malbonan rikolton en 1430, 1550 kaj 1590 kaŭzis malvarma vetero. Tio montras, ke la malvarma tajdo komenciĝis en Orienta Azio kaj iom post iom moviĝis okcidenten.

## PERIODO DE LOKAJ KRONIKOJ (1400-1900 p. K.)

Lastatempe, laŭ 665 lokaj kronikoj, oni faris statistikon de la glaciiĝaj jaroj de la lagoj Tajhu, Bojang kaj Dongting kaj la riveroj Hangiang kaj Huajhe, dum la periodo de la 13-a ĝis la 20-a jarcento, kaj de la neĝaj kaj prujnaj jaroj de la tropika regiono je nivelo proksima al tiu de la maro komence de la 16-a jarcento. El la menciita materialo oni povas vidi, ke en nia lando frostaj vintroj aperis en la periodoj 1470-1520, 1620-1720 kaj 1840-1890. Se paroli pri la malvarmeco de la jarcentoj, la 17-a jarcento okupas la unuan lokon kaj la 19-a jarcento la duan.

Tiu rezulto estas preskaŭ koincida kun la glaciiĝa tempo de la japana Sva-lago (situanta en 36° de la norda latitudo kaj 138° de la orienta longitudo). La diferenco estas tio ke la datoj de la komenco kaj fino de la periodo de la japanaj frostaj vintroj estas 25-jare pli fruaj ol tiuj de Ĉinio.

Supre mi jam diris, ke la vintroj de la 15-a ĝis la 19-a jarcento estis relative malvarmaj kaj tiuj de la 17-a jarcento estis la plej malvarmaj, precipe tiuj de 1650-1700. Ekzemple, la mandarinaj kaj oranĝaj fruktoĝardenoj de Gianghi-provinco estis tute detruitaj de atakoj de frosto en 1654 kaj 1676. Dum tiuj kvindek jaroj, Tajhu-lago, Hangiang-rivero kaj Huajhe-rivero glaciiĝis kvarfoje kaj ankaŭ Dongting-lago dufoje. Ankaŭ en la tropika areo de nia lando ofte glaciiĝis kaj neĝis. Laŭ notoj de la tiamaj vojaĝantoj, la glaciiĝa periodo de la Kanalo inter Pekino kaj Tiangin estis ĉ. 107 tagoj en la periodo de la vintro de 1653 ĝis la printempo de 1656, dum nun estas nur 56 tagoj. Laŭ fenologiaj fenomenoj oni povas konstati, ke la meznombra jara temperaturo de Pekino en la meza parto de la 17-a jarcento estis je 2°C pli malvarma ol la nuna. La tiama vintra temperaturo estis je 4°C pli malvarma ol la nuna.

## PERIODO DE OBSERVADO PER INSTRUMENTOJ

En King-dinastio (1644-1910) Pekino, Nankino, Hangĝoŭ kaj Suĝoŭ havis registrojn pri pluvaj tagoj. Laŭ la meznombraj neĝadaj periodoj oni povas konstati, ke la temperaturo de la periodo 1801-1850 estis pli varma ol tiu de la periodoj 1751-1800 kaj 1851-1900. Tio estas koincida kun la supre dirita konstataĵo.

La temperaturo de Ŝanhajo ŝanĝiĝis jene: la klimato de Ŝanhajo en la lastaj 25 jaroj de la 19-a jarcento estis malvarma. La vintra temperaturo de ĉ. 1897 atingis la meznombron, poste dum 14 jaroj ĝi estis super la meznombro. Ĉirkaŭ la periodo 1910-1928 la temperaturo denove malaltiĝis ĝis sub la meznombro, poste ĝi altiĝis kaj en 1945-1950 superis la meznombron je 0.6°C. De tiam la temperaturo iom post iom malaltiĝis kaj en 1960 ĝi releviĝis ĝis la meznombro. Dum tiuj pli ol 80 jaroj, la temperaturo ŝanĝiĝis inter 0.5°C kaj 1°C. Tiu ŝanĝiĝo rekte influis la kreskon de vegetaĵoj kaj animaloj, nerekte regis la aperon de plagoj de plantmalsanoj kaj fiinsektoj kaj influis la agrikulturan aktivadon kaj produktadon.

La evoluo de la temperaturo de Ĉinio en la lastaj 80 jaroj influis la leviĝon kaj malleviĝon de la neĝlinio kaj glaciriveroj de Tianŝan-montaro. Laŭ esplorado de la Glaci-rivera Taĉmento de la Ĉina Akademio de Sciencoj, pro varmiĝo en la 50 jaroj

(1910-1960) la neĝlinio de Tianŝan altiĝis je 40-50 metroj, la okcidentaj glaci-riveraj langoj retiriĝis je 500-1,000 metroj, kaj la orientaj glaci-riveraj langoj retiriĝis je 200-400 metroj. Samtempe kun tio, ankaŭ la arbara limo iom altiĝis. Ĉar novaj glaciriveraj akumulaĵoj estas trovitaj, tial oni opinias, ke la glaci-riveroj sur la altaj montpintoj de Tianŝan-montaro estas kreaĵo de la historia periodo 1100 ĝis 1900, sed ne glaci-rivera restaĵo de kvaternaro.

* * *

Nun oni povas eltiri jenan unuapaŝan konkludon: 1. En la unuaj 2,000 jaroj de la lastaj 5,000 jaroj de Ĉinio (t.e. de la periodo de la Jangŝaŭ-kulturo de la epoko de primitivaj triboj ĝis Jinŝju-periodo de Anjang de la sklava socio), la meznombra jara temperaturo plejparte estis je ĉ. 2°C pli alta ol la nuna, kaj tiu de januaro je 3°C-5°C. 2. Poste, okazis serio da ŝanĝiĝoj. En la jaroj 1000 a. K. kaj 400, 1200 kaj 1700 p. K. la skalo de la ŝanĝiĝo de la jara meznombra temperaturo estis 1°C-2°C. 3. En ĉiu periodo de 400 ĝis 800 jaroj, oni povas distingi malgrandan rivoluan periodon de 50 ĝis 100 jaroj. La skalo de la temperatura ŝanĝiĝo estas 0.5°C-1°C. 4. En tiuj rivoluaj periodoj, ĉiu el la plej malvarmaj periodoj verŝajne estis komencitaj de la orientazia pacifika marbordo kaj iom post iom moviĝis okcidenten al Eŭropo kaj la afrika atlantika marbordo, kaj samtempe ankaŭ estis tendenco de moviĝo de nordo al sudo.

Se ni komparas la temperaturan ŝanĝiĝon de Eŭropo depost la tria jarcento kun tiu de Ĉinio, ni trovas, ke certa rilato troviĝas inter ili. La temperatura ŝanĝiĝo de Eŭropo ofte okazis post tiu de Ĉinio. La leviĝo kaj malleviĝo de neĝlinio havas certan rilaton kun la temperatura ŝanĝiĝo. Se ni komparas niajn konstataĵojn kun la leviĝo kaj malleviĝo de la neĝlinio de Norvegio, ni vidas ke ili koincidas ĝenerale, nur kun diferenco de frueco. Nur en 400 a. K. en Norvegio aperis malvarma periodo nevidita en Ĉinio.

Lastatempe, la Fizika Instituto de la Kopenhaga Universitato de Danlando faris esploron pri la temperaturo dum glaciiĝo en glacirivero sur Grenlando per izotopo 018. La temperatura ŝanĝiĝo de Grenlando en la pasintaj 1,700 jaroj koincidas kun tiu de nia lando. Kaj krome, antaŭ 3,000 jaroj en Ĉinio estis malvarma periodo, kaj oni ricevis saman konstataĵon en Grenlando ankaŭ per izotopo 018.

En tiu ĉi artikolo, ni konjektis la kilmatan evoluon en antikveco ĉefe per fenologia metodo. Fenologio estas la plej antikva studo pri klimato. La konstato pri antikva temperaturo per mezuro de antikvaj glacio kaj akvo per la proporcio de izotopoj 018 kaj 016 estas metodo de la lasta tempo. La rezultoj akiritaj per la du malsamaj metodoj estas ĝenerale koincidaj. Tio pruvis, ke fenologiaj materialoj en antikvaj historiaj verkoj povas esti efike uzataj en studo pri antikva klimato.

## Kurantaj Aferoj

### FOSILIOJ NOVE TROVITAJ

En jaroj 1970-1973 la Instituto pri Pravertebruloj kaj Prahomoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj trovis pli multajn fosiliojn de mamuloj de paleoceno el la ruĝa tertavolo en la gubernioj Kianŝan, Hjuanĉeng de Anhuj-provinco, Daju-gubernio de Gianghi-provinco kaj Ĉaling-gubernio de Hunan-provinco, post kiam ĝi trovis tiajn fosiliojn en la jaroj 1962-1963.

Paleoceno estas la plej proksima epoko en la evolua historio de la tero, nome la komenca periodo de kenozoiko. Ĝi komenciĝis antaŭ sepdek milionoj da jaroj kaj finiĝis antaŭ la sesdek milionoj da jaroj. Paleoceno estas grava periodo en la evolua historio de mamuloj.

La supre nomitaj riĉaj fosilioj trovitaj en niaj sudaj provincoj apartenas al pli frua epoko kaj inkluzivas pli ol 30 novajn genrojn kaj speciojn de mamuloj netrovitajn antaŭe en aliaj regionoj. Tiuj fosilioj estas gravaj materialoj por koni la ruĝan tertavolon de la suda Ĉinio kaj ankaŭ por teorie esplori pri multaj problemoj koncerne al genezo, evoluo, translokiĝo kaj disvastiĝo de mamuloj.



*La Pekina Biblioteko*

# PEKINA BIBLIOTEKO

LA Pekina Biblioteko kun areo de 50,000 kvadrataj metroj estas la plej granda biblioteko de Ĉinio. Ĝi estas ĉinstila palaca konstruaĵo en la centro de Pekino apud la bela Bejhaj-parko kaj la Malnova Palaco. Ĝia vasta kaj kvieta korto estas borderita de malaltaj pinarboj kaj ornamita de diversaj floroj.

Antaŭ nelonge ni vizitis tiun bibliotekon. Ĝia respondeculo prezentis al ni ke la biblioteko jam havas historion de pli ol 60 jaroj kaj nun konservas 9 milionojn da libroj, t.e. 7-oblo de tiuj de la komenca periodo post la Liberiĝo.

Unue ni rigardis la apartan konservejon de revolucia literaturo. Tie estas konservitaj parto de manuskriptoj kaj korespondaĵoj de Marks kaj Engels, ekzemplero de la unua eldono de *Kapitalo* de Marks en la franca lingvo, numeroj de la ĵurnalo *Antaŭen* eldonita de Lenin en la jaro 1905 en Ĝenevo, manuskriptoj kaj verkoj de Prezidanto Maŭ en diversaj eldonoj, numeroj de *Gvidisto*, la plej frua organo de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la gazeto *Geknaboj* redaktita ĉefe de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj en sia juneco en la Pariza Komunisma Grupo, k.a. Antaŭ la Liberiĝo, konservo de tiaj revoluciaj libroj, gazetoj kaj manuskriptoj estis malpermesata al la biblioteko. Dank' al aparta atento de la Partio pri kolekto de revolucia literaturo, la biblioteko kolektis dum la pli ol 20 jaroj post la Liberiĝo eldonaĵojn pri la internacia komunisma movado kaj librojn kaj gazetojn pri la ĉina revolucio en diversaj historiaj periodoj. Tie konservitaj estas ankaŭ valoraj originaloj kaj manuskriptoj de pli ol 100 ĉinaj kaj fremdlandaj verkistoj kiaj Lusin, Guo Moĵuo, Anna Louise Strong k.a. La *Elektitaj Verkoj de Lusin en Manuskripto* estas nun kompilata de koncerna institucio por esti presita ofsete. Krome en la biblioteko estas ankaŭ libroj kaj gazetoj en la lingvoj de 24 el niaj nacimalplimultoj manĉua, mongola, ujgura, kazaka k.a.

La Pekina Biblioteko estas renoma pro sia konservo de raraj antikvaj libroj. Ni venis al tiu konservejo. Tie estas sennombraj kaj diversformaj plat-

presaĵoj de surskriboj sur testudaj ŝeloj kaj bestaj ostoj, frappresaĵoj de *Ding*-oj (metalaj tripiedaj potoj) kaj ŝtonplatoj kaj sutroj kopiitaj en la antikveco. Laboranto prezentis al ni rarajn librojn inter kiuj estas *Dunhuang-a Sutro* de la kvina jarcento p.K. en formo de volvaĵo, parto de la originalo de *Jongle Dadian* (enciklopedio kompilita en la jaro 1408), la eleganta kolora *Ŝiĝuĝaj Ĉianpu* de la 17-a jarcento, kaj *Siku Ĉjuanŝu* kompilita kaj reviziita en la regperiodo de Kianlong (1736-1795) de King-dinastio, en kiu troviĝas pli ol 36,000 ekzempleroj de pli ol 3,400 specoj de antikvaj libroj kun preskaŭ miliardo da ideografiaĵoj. Ĉiuj tiuj libroj restas ĝis nun sendifektaj. Kaj nun la nombro de raraj antikvaj libroj jam atingis 330,000 ekzemplerojn.

Antaŭ la Liberiĝo kolektado kaj konservado de fremdlandaj libroj kaj gazetoj jam estis komencitaj en la biblioteko, tamen grandnombra kolektado komenciĝis nur post la Liberiĝo. Nun tie estas 3,700, 000 ekzempleroj da libroj kaj gazetoj en pli ol 60 fremdaj lingvoj. Inter ili troviĝas pli ol 4,000 specoj de eŭropaj unuepresitaj kaj lulilaj ekzempleroj de la 16-a kaj 17-a jarcentoj, antikvaj eldonaĵoj de la rusa lingvo, antikvaj kaj fajnaj ksilografiaj presaĵoj de Japanio, k.a. Tiuj libroj kaj gazetoj spegulas de malsamaj anguloj la disvolviĝon kaj ŝanĝiĝon de diversaj landoj en la nunaj kaj antikvaj politiko, ekonomio kaj kulturo, kaj liveras gravajn materialojn por studi iliajn historion kaj kulturon.

La Pekina Biblioteko allogas multajn legantojn per sia riĉa konservo de libroj kaj bona medio por legado. Ĉiutage la legoĉambroj de Marksismo-Leninismo, scienco kaj tekniko, gazetoj kaj ĵurnaloj, kaj tri aliaj akceptas ĉ. mil legantojn.

Ni ascendis la duan etaĝon de la biblioteko. Kontraŭ la ŝtuparo estas ĉambro de katalogokartoj, kie multaj legantoj serĉas sian ŝatatan libron.


Laboranto de la Pruntedona Sekcio konigis al ni sian servon. Li diris, ke pro la progreso de scienca esplorado, la demandoj elmetitaj de legantoj estas pli kaj pli detalaj. Li diris : "Nia biblioteko bezonas laborantojn kun riĉa scio por solvi specialajn demandojn de la legantoj. Pro tio la biblioteko speciale starigis Konsultan kaj Referencan Departementon, kies laborantoj devas legi grandan nombron da libroj, fari specialan studadon pri fakaj problemoj kaj ellabori katalogojn pri diversaj specialaj temoj kaj indeksojn de resumoj. Per tio ili povas helpi la legantojn solvi malfacilajn demandojn aŭ plenumi taskon kune kun laborantoj de ŝtataj institucioj, sciencaj institutoj kaj produktaj entreprenoj."

Fine ni eniris en la larĝan ĉambron de la Internacia Interŝanĝa Sekcio kaj trovis sur la bretaro kaj skribotabloj grandan nombron da diversaj libroj kaj gazetoj el fremdaj landoj. Ni poste informiĝis ke la biblioteko jam havas interrilaton kun pli ol 3,400 unuoj en pli ol 120 landoj kaj regionoj por donaco kaj interŝanĝo de libroj kaj gazetoj. Tio ne nur akcelis la interŝanĝon kaj la disvolviĝon de scienco kaj kulturo, sed ankaŭ pliigis la komprenon kaj amikecon inter la ĉina kaj alilandaj popoloj tra la mondo.

*La Internacia Interŝanĝa Sekcio*



*La ĉambro de katalogokartoj*



# La insula lando en Mediteraneo

de ĜONG HAŬ

AEROPLANO flugas super la senlima maro, kaj verda fiŝforma insularo sin ĵetas en la okulojn de homoj. Ĝi estas la heroa lando Malto, kiu staras ĉe la koro de Mediteraneo.

En la lasta tagdeko de junio de la kuranta jaro, la Ŝanhaja Akrobata Trupo kun plena profunda amikeco de la ĉina popolo flugis al Malto por fari vizitadon kaj prezentadon, kaj ĝuis amikan bonvenigon kaj komplezan akcepton de la gastigantaj registaro kaj popolo. Dank' al la vizitado, la akrobata trupo unuapaŝe konis la gloran batalan tradicion de la insula popolo kaj ricevis edukon.

## SINCERA AMIKECO

La akrobata trupo estas la unua grupo el la ĉinaj literaturaj kaj artaj senditoj vizitanta tiun ĉi landon. La afabla kaj serena malta popolo verŝis sian sinceran amikecon al la ĉina popolo sur la ĉinajn akrobatojn. Maltaj amikoj diris: "Via alveno vigligis la tutan insulon." "Via brila prezentado fariĝis nia paroltemo." Kiel en festotago, maltanoj svarmis al la teatro por rigardi prezentadon de la akrobata trupo. Nemalmultaj maljunaj fiŝistoj ŝipe veturis de Gozo-insulo trans la maro por viziti la ĉinajn amikojn. Naivaj infanoj donacis al la ĉinaj akrobatoj memfaritan metiartaĵon post la rigardado. Ĉiu prezentado ricevis foja-refojajn varmajn aplaŭdojn kaj huraojn de la spektatoroj.

Frue antaŭ la alveno de la akrobata trupo, la akceptantoj de Malto jam faris multajn kaj detalajn preparojn: Oni transformis scenejon por opero en tiun por akrobataĵoj post tagnokta urĝa laborado; la dormĉambroj por la ĉinaj akrobatoj estis nove kalkitaj. Ĉiam kiam la ĉinoj revenis post prezentado, la laborantoj de la restoracio tuj portis al ili bongustajn manĝaĵojn. Ankaŭ la akrobatoj meminiciate balais scenejon, lavis servicojn kune kun maltaj laborantoj, kaj regalis ilin per prezentado. Ambaŭ flankoj starigis profundan amikecon inter si en longa kunestado. Je la adiaŭo, la laborantoj de la restoracio donacis al la ĉinaj aktoroj grandan freŝan florbukedon, kaj scenejaj laborantoj adiaŭis ilin kune kun sia tuta familio. Gastoj kaj gastigantoj bedaŭre diris adiaŭ unu al alia per la vortoj ĵus lernitaj kaj strikte ĉirkaŭpremis. Multaj el ili eklarmis pro emociiĝo.

La maltaj registaraj oficistoj tre zorgis la akrobatan trupon. Ministro de eduko kaj kulturo S-ino Agatha Barbara vizitis la ĉinajn akrobatojn tuj post la finiĝo de la parlamenta sesio. En la tago de atingo de la ĉina akrobata trupo, la ĉinaj akrobatoj kaj scenejaj laborantoj dekoraciis la scenejon ĝis profunda nokto. Ĝuste en tiu momento S-ro Paul Naudi, konstanta sekretario de Ministerio de Eduko kaj Kulturo, persone vizitis la trupon kunportante noktajn manĝaĵojn. La tago de la unuafoja prezentado de la akrobata trupo ĝuste estis la dato de lia naskiĝo, tial la gvidanto kaj aktoroj de la ĉina trupo multe tostis al li en la vespermanĝo de tiu tago. Li diris kun emocio: "Mi estas fiera ke la dato de mia naskiĝo estas ĝuste en la tago de starigo de amikeco inter ni kaj la ĉina popolo. La koro de ĉiu malta viro, virino kaj infano batas samtakte kun tiu de la ĉina popolo. Estas en la mondo io neaĉetebla per mono, tio estas amikeco. La amikeco inter Ĉinio kaj Malto estas firma kaj neniam rompiĝos post sia ekstariĝo."

## GLORA BATALO

La malta popolo havas gloran historion de batalo. De multaj jarcentoj ili rezistis unuj post aliaj kontraŭ deeksteraj invadoj kaj skribis per sia sango epopeon por nacia sendependeco.

Malto kun 320,000 loĝantoj kaj areo de pli ol 300 kvadrataj kilometroj konsistas el kvin malgran-

*La Ŝanhaja Akrobata Trupo faras prezentadon en la operejo de Valeto kaj estas varme bonvenigata.*




daj insuloj, inter kiuj la plej granda estas Malto-insulo. Kiel la nodo de mara trafikado interliganta Azion, Afrikon kaj Eŭropon, Malto de longe estis ĉasaĵo de la rivalado de agresantoj. Sed ĉiuj agresoj trafis bravajn rezistojn de la malta popolo.

Kun respekto niaj akrobatoj pririgardis la historiajn restaĵojn de tiu ĉi lando. Antikvaj kasteloj konstruitaj kontraŭ deeksteraj invadoj troviĝas ĉie sur la insuloj kaj alte staras statuoj kaj monumentoj de gajnantoj de nacia sendependeco. La maltaj akompanantoj rakontis al la ĉinaj gastoj multajn kortuŝajn batalajn historiojn.

La ĉefurbo Valeto ja estas la atestanto de la batala historio de la malta popolo. En la jaro 1565, la popolo de la tuta insulo faris tie grandskalan defendon, venkis la invadantojn kaj per tio skribis en la historio brilan paĝon. Tiam, kelkdek mil malamikoj kun supereca batalforto freneze invadis la insulon, kaj la insulanoj leviĝis por kontraŭbatali per lancoj kaj memfaritaj pafiloj. Ankaŭ la virinoj kaj infanoj iris al la fronto kaj batis la malamikojn per ŝtonpecoj kaj brulantaj gudritaj kartonoj. 260 soldatoj gardantaj en iu kastelo ne kapitulacis al la malamikoj, sed senescepte heroe martiriĝis. La brava batalado de la popolo fine devigis la malamikojn al panika forfuĝo kaj sekurigis la insulon. Por memorigi tiun ĉi defendan batalon, la ĉefurbo nomis sin Valeto, kiu estis la kavalira ĉefo tiam komandanta la batalon, Nun en la rezidejo de la ĝenerala gubernatoro konstruiĝis Ekspozejo de Armiloj, kiu montras kaskojn, kirasojn, memfaritajn pafilojn, lancojn kaj ŝildojn. Ekster la rezidejo staras statuoj de la bravuloj tiam partoprenantaj en la defenda batalo.

En la jaro 1798, napoleona armeo invadis Malton. Ankaŭ tiuj agresantoj trafis la obstinan reziston de la malta popolo. Tiam ok gvidantoj de kamparana insurekcia armeo malfeliĉe falis en la sieĝon de la malamikoj. Sed anstataŭ surgenuiĝi ili preferis sinoferon, kaj unu el ili aplombe demetis sian kirason antaŭ la martiriĝo kaj fiere diris al la malamikoj: "Vi pafu, la malta popolo estos ne finbuĉebla!" La buĉado vekis pli fortan kontraŭstaron. Maltanoj kun bastono kaj ŝtonpecoj sturmis la malamikan komandejon, kaptis la malamikan komandanton kaj malsuprenĵetis lin de balkono. Poste Malto fariĝis por kelke da tempo ko-

lonio de Britio. Post la Dua Mondmilito, la malta popolo plurfoje kondukis amasan batalon por sendependeco, kaj fine en la jaro 1964 ili gajnis sendependecon. De tiam la nacia flago de Malto alte flirtas super la insulo.

Post la vizitado de la gubernatora rezidejo, iu malta akompananto diris al niaj akrobatoj: "Nia venko montras al la tuta mondo, ke malgranda lando kun nur 300,000 loĝantoj povas gajni sendependecon se ĝi kuraĝas batali."

Nun, sub la gvido de ĉefministro Dominic Mintoff, la maltaj registaro kaj popolo daŭre batalas kontraŭ la agresado de imperiismo kaj por firmigo de nacia sendependeco. La tuta akrobata trupo esprimis respekton al tia spirito de la malta popolo.

## EKONOMIO EN DISVOLVIĜO

En la vizitado niaj akrobatoj vidis kun ĝojo ke sur la insulo nur "kun marakvo, sunradioj kaj ŝtono" la maltaj popolanoj diligente disvolvas sian nacian ekonomion. Sur la plaĝoj ili entreprenas ŝip-riparadon, ŝip-konstruadon kaj sal-faradon. Ili ankaŭ starigis industriojn de konstruaj materialoj, tekstilado, kaŭĉuko, kemio kaj mekanikaj fabrikado kaj prilaborado. Aliaj novaj industriaj objektoj estas en preparado, kaj turisma servo en disvolviĝo.

La akrobatoj vizitis la plej grandan entreprenon — ŝipkonstruan kompanion en Malto. La bruantaj maŝinoj, okulfrapaj veldaj fajreroj, navede kurantaj kamionoj kaj diligentaj laboristoj formis vivan laboran scenon. Ĝi estas deprenita de fremduloj. Post sia administrado oni pliigis al ĝi maŝinojn, ekipaĵojn kaj disvastigis ripardokon. Antaŭe ĝi povis nur ripari ŝipojn dum nun ĝi jam povas konstrui. La totala produkta valoro de ĉiu jaro jam estas multe pli granda ol tiu antaŭ la sendependeco.

Samtempe kun tio, Malto forte disvolvas sian nacian kulturon. La ŝtataj lernejoj efektivigas senpagan edukadon. Lernantoj unue devas lerni la maltan lingvon. En la jaro 1972, la malta registaro transformis la antaŭan tenejon de la fremdlanda mararmea bazo en teknikan instituton por kulturi naciajn teknikistojn.

Malto komencis ankaŭ sian akrobatan arton. La ĵus establita akrobata grupo konsistas el 40 profesiaj kaj amatoraj aktoroj. Ĉiaj elstaraj kalistenaj akrobatoj kun ludiloj venis al la teatro por interŝanĝi sperton kun la ĉinaj kolegoj kaj ili fariĝis bonaj amikoj.

Kvankam la Ŝanhaja Akrobata Trupo vizitis la heroan insulan landon nur kelkajn tagojn, tamen la amikeco starigita inter la ĉina kaj malta popoloj en la kuna batalo kontraŭ imperiismo eterne restos kiel Mediteraneo.



*Maltaj lernantoj esprimas sian amikecon al ĉinaj gastoj per montro de koloraj bildoj pri ĉinaj akrobataĵoj.*


# Batalo de latinamerikaj landoj por nacia sendependeco

EN la lastaj jaroj, la batalo de latinamerikaj landoj por protekti nacian sendependecon kaj defendi ŝtatan suverenecon havis novan disvolviĝon. Nun, pli kaj pli multaj landoj aplikis dispoziciojn kontraŭ la ekonomia prirabado kaj superrego fare de imperiismaj landoj. Dum defendo de la suvereneco de teritoriaj maroj kaj maraj riĉfontoj, ili ankaŭ ŝtatigis iujn ĉefajn min-riĉfontojn. Surbaze de tio, ili aktive disvolvis sian nacian industrion kaj jam akiris en tio rimarkindan sukceson.

## PROTEKTI ŜTATAN SUVERENECON

Meksikio, Ĉilio, Peruo, Ekvadoro, Venezuelo kaj aliaj landoj sinsekve ŝtatigis, spite al subpremo kaj venĝo de la superpotenco, la ĉefajn minajn fontojn kiaj kupro, fero, petrolo, salpetro kaj sulfuro. Kaj por protekti la suverenecon de teritoriaj maroj kaj marajn riĉfontojn, plejparto de latinamerikaj landoj ĉiam persistas ĉe la justa starpunkto de 200-mejla marteritorio. Peruo, Ekvadoro, Meksikio kaj aliaj marbordaj landoj decideme arestis fremdlandajn fiŝŝipojn, kiuj kontraŭleĝe entrudiĝis en iliajn teritoriajn marojn por fiŝado, kaj punis ilin per mono. Kun disvolvo de nacia ekonomio, Gvajano, Meksikio kaj Peruo ankoraŭ klopodas disvolvi nacian kulturon, nacian edukan kaj sciencan aferojn por elimini la kulturan agreson kaj monopolon de imperiismo super scienco kaj tekniko en tiu regiono.

Nun, la latinamerikaj landoj iom post iom unuiĝas al batalo kontraŭ imperiismo kaj hegemonio de la grandaj potencoj. Ili plifortigas solidarecon kaj subtenas unu la alian per ambaŭflankaj kontaktoj, regiona kunlaboro kaj internaciaj konferencoj, kaj ludas ĉiam pli gravan rolon en la internaciaj aferoj unuiĝante kun aliaj landoj de la tria mondo. En la lastaj jaroj la gvidantoj de la latinamerikaj landoj ofte faris vizitojn unu al alia. Pere de la vizitado ili interŝanĝis opiniojn pri pro-



*Peruo ŝtatigis la tutan havajon de la Internacia Petrola Kompanio funkciigita de usona kapitalo. La foto montras petroltenejon en la antaŭurbo de Limo, ĉefurbo de Peruo.*

blemoj interesantaj al ambaŭ flankoj, akordigis respektivajn starpunktojn kaj asertis refoje la komunan deziron defendi la ŝtatan suverenecon kaj oponi kontraŭ interveno kaj superrego de grandaj potencoj. La landoj en la regionoj de Andoj kaj Kariba Maro disvolvas reciprokajn komercadon kaj ekonomian kunlaboron. La Organizo de Andoj-pakto formita de Ĉilio, Ekvadoro, Peruo kaj aliaj tri landoj akiris novajn sukcesojn en limigo kaj elimino de monopola kapitalo de fremdaj landoj, malpliigo de la importitaj industriaĵoj kaj akordigo de la planoj de industria disvolviĝo inter la membrolandoj, kaj ankaŭ ilia reciproka komercado multe disvolviĝas.


En la Tria Komerca kaj Disvolva konferenco de UN en aprilo de 1972 kaj en la konferenco de Ministroj de Eksteraj Aferoj de Nealiancitaj Landoj en aŭgusto de la sama jaro, reprezentantoj de la latinamerikaj landoj pledis por egaleco inter grandaj kaj malgrandaj landoj en internaciaj aferoj kaj postulis starigi justan kaj racian ekonomian interrilaton. En la sinsekvaj konferencoj de la Marlita Komitato de UN, la latinamerikaj landoj faris neŝanceleblan batalon por gajni internacian agnoskon pri la rajto de 200-mejla marteritorio kaj oponi kontraŭ la mara hegemonio de la superpotencoj. En marto de la kuranta jaro, laŭ la postulo de la panama registaro, la Sekureca Konsilantaro de UN okazigis kunvenon en la urbo Panamo. Reprezentantoj de multaj latinamerikaj landoj kaj aliaj landoj de la tria mondo aktive subtenis Panamion pri ĝia justa starpunkto repreni la suverenecon super la "zono de la kanalo" kaj refoje asertis ilian oponon kontraŭ la hegemonio, ke grandaj landoj tiranas malgrandajn kaj fortaj malfortajn.

## DISVOLVI NACIAN INDUSTRION

Jam de longe, pro la ekonomia agreso de imperiismo, la nacia industrio de plejparto de la latinamerikaj landoj progresas malrapide kaj iuj landoj nur povas produkti unikan aŭ kelkajn agrikulturajn kaj minajn produktaĵojn adaptatajn al la eksterlandaj merkatoj. Tio kaŭzis al tiuj landoj seriozan dependecon sur fremdaj landoj en ekonomio, tiel ke ili devas interŝanĝi tiujn produktaĵojn kontraŭ industriaj produktaĵoj. Ĉio ĉi tio estas malbona sekvo de la kolonia regado kaj imperiisma agresado.


Ni prenu la eksporton de 1960 de iuj landoj kiel ekzemplon: La eksporta sumo de kafo de Kolombio okupis 71.8% de ĝia totala eksporta sumo, kupro de Ĉilio 74.4%, stano de Bolivio 64.8%, petrolo de Venezuelo 91.2%. Kvankam en la lastaj jaroj la stato iagrade ŝanĝiĝis, tamen en 1970 la eksporta sumo de petrolo, kupro, fero, kafo, greno, viando, sukero, banano, kotono kaj lano de la latinamerikaj landoj ankoraŭ atingis 9,012,000,000 usonajn dolarojn kaj okupis 52% de ilia totala eksporta sumo. Tial, kiam la internacia monopola kapitalo malaltigis la prezon de tiuj produktaĵoj en la monda merkato, tiuj eksportantaj landoj suferis gigantan ekonomian perdon. En la jaro 1972, la akra malleviĝo de kupra prezo sur la internacia merkato kaŭzis al Ĉilio perdon de ĉ. 200,000,000 usonaj dolaroj.

En la lastaj jaroj, multaj latinamerikaj landoj, kiuj suferis de tia anomalia disvolviĝo de ekonomio, akiris certan progreson en defendo kaj disvolvo de nacia industrio por kreskigi specojn de




*La submara karbominejo de Lota en suda Ĉilio kun historio de pli ol 100 jaroj jam estas ŝtatigita.*

eksportaj produktaĵoj. Laŭ informo, en 1970 industria produkto de Meksikio pliiĝis je 90.6% kompare kun tiu de 1963; ĝia eksporta sumo de industriaĵoj en 1971 kvinoble kreskis ol tiu de 1960; la proporcio de la eksporta sumo de industriaĵoj en la totala sumo de eksportaĵoj leviĝis de 12% de 1960 ĝis 32% de 1971. Salvadoro de la meza Ameriko ĉefe eksportis en la pasinteco kafon, bananon kaj kokaon, la eksporta sumo de tiuj tri produktaĵoj en 1960 okupis 84% de ĝia totalo. Sed en la lastaj jaroj, ĝiaj tekstila kaj kemia industrioj iagrade progresis, tio pliigis la eksportan sumon de industriaĵoj, ke ĝia proporcio en la totala eksporta sumo kreskis de 5.5% de 1960 ĝis 31% de 1971. Ankaŭ la industrio de Peruo, Argentino kaj Panamio havis malsamgradajn progresojn en la lastaj jaroj. En la pasinteco Argentino ĉefe eksportis grenon kaj viandon, tamen nun eksportas industriaĵojn de 60 specoj respektive kun pli ol unu milionoj da usonaj dolaroj.



*Parto de la petrolekspluatejo sur la lago Maracaibo de Venezuelo*

## DEFENDI PETROLAN FONTON

Petrolo estas grava riĉaĵo por la latinamerikaj landoj, kaj ĝia produktokvanto okupis gravan lokon en la mondo. Venezuelo, Ekvadoro, Argentino, Peruo, Meksikio, Trinidado kaj Tobago havas riĉan rezervaĵon de petrolo. Tamen delonge tiu ĉi grava riĉfonto estis prirabata de fremdlanda monopola kapitalo. Ĝi okupis grandajn pecojn de petrola koncesia tero, tenis petrolan ekspluatan rajton, monopolis la prilaboron kaj vendon de petrolo kaj forrabis mirindan profiton.

Iuj latinamerikaj landoj petrolproduktaj jam delonge faris batalon por protekti sian petrolfonton. Kaj en la lastaj jaroj tiu batalo disvolviĝis vigle kaj donis pezan baton al la fremdlanda kapitalo. De oktobro de 1968, Peruo iom post iom efektivigis ŝtatigon al sia petrolfonto, reprenis la rajton pri ekstrakto kaj vendo de petrolo, petrolkemiajn entreprenojn kaj plurajn pecojn da petrola koncesia tero entenatajn de fremdlandaj petrolaj kompanioj. Ankaŭ Venezuelo, la plej grava lando de petrola produktado kaj eksportado, plifortigis kontrolon super la fremdlandaj petrolaj kompanioj. Antaŭ nelonge la parlamento de Venezuelo adoptis dekreton, laŭ kies difino la ŝtato devas tute efektivigi regadon super la enlanda merkato de petrolo kaj ĝiaj produktaĵoj en kvar jaroj. En la fino de 1972 Ekvadoro senpage ŝtatigis 70% de petrola koncesia tero. Venezuelo kaj Ekvadoro publikigis respektive petrolan leĝon konforman al siaj nunaj ŝtataj interesoj, plialtigis la referencan prezon kaj imposton de petrolo por limigi la privilegion de fremdlanda kapitalo kaj pligrandigi la ŝtatan financan enspezon.

Nun, la latinamerikaj landoj klopodas plifortigi la unuiĝon inter si, kunlaboron kun aziaj kaj afrikaj landoj por kune oponi kontraŭ la prirabado de fremdlanda monopola kapitalo al iliaj naturaj riĉfontoj. En septembro de 1960, Venezuelo, Irako, Irano, Kuvajto kaj Saudi-Arabio kiuj abunde produktas petrolon, starigis Organizon de Petroleksportantaj landoj. Ĝi nun havas 11 membrolandojn, kiuj faras batalon por defendi la enspezon de petrolo. En februaro de 1965, Peruo, Ĉilio, Meksikio, Argentino kaj aliaj kvin landoj starigis la Latinamerikan Ŝtatan Petrolan Interhelpon. En aŭgusto de 1972 kaj aprilo de 1973, 20 latinamerikaj landoj okazigis du konsiliĝajn kunvenojn de ministroj de petrola kaj energia fontoj. En la aprila kunveno de la kuranta jaro ili diskutis pri ekspluato kaj utiligo de energia fonto en Latinameriko kaj plifortigo de regiona kunlaboro pri petrola riĉfonto.

Nun iuj latinamerikaj landoj iom post iom ekspluatas petrolan fonton kaj disvolvas petrolan produkton per siaj propraj fortoj. Ili gajnos ankoraŭ novan venkon en protekto de ŝtata suvereneco, defendo de petrola fonto kaj disvolvo de nacia ekonomio.

# Drogherbo Lingĝi



*Drogherboj* lingĝi *kreskintaj pli ol 3 monatojn kulturate de homoj.*

EN Ĉinio, cirkulas multaj rakontoj kaj mitoj pri la herbo *lingĝi (Fomes japonicus Fr.)*, kiu povas revivigi mortintojn, longigi la vivon de homoj kaj rejunigi maljunulojn.

Rakontoj respegulas nur belan idealon de la homoj kaj neniam fariĝos fakto. Tamen, la fakto estas, ke *lingĝi* havas altan farmacian valoron. Niaj antikvaj kuracistoj kaj farmaciistoj jam faris certan esploron pri la herbo. Uzi verfungojn kiel drogon, tio estis registrita plejfrue en la farmacia libro *Ŝen Nong Ben Caŭ Ĝing* verkita en Han-dinastio antaŭ 2,000 jaroj. En sia farmacia verko *Ben Caŭ Gang Mu* la granda farmaciisto Li Ŝiĝen (1518-1593 p.K) de Ming-dinastio faris detalajn notojn pri la klasifikado kaj farmacia valoro de *lingĝi*. La recepto en la libro opinias, ke *lingĝi* estas dolĉeta, varmetiga kaj senvenena, kiu povas kuraci surdecon, sanigi artikojn, vigligi spiriton kaj fortikigi tendenojn kaj ostojn, kaj se oni longtempe prenas ĝin, li povas teni la junecon kaj longigi la vivon.

Pro la rareco, dum la pli ol 2,000 jaroj *lingĝi* estis malofte uzita en kuracado. Oni kreis multajn mitojn pri la eksterordinara fungforma herbo. Profitante aperon de *lingĝi* en iuj lokoj kaj tempoj, feŭdaj regantoj de la ĉinaj diversaj dinastioj propagandis pri sia "laŭdinda regado" por mistifi la popolon kaj firmigi sian regadon. Tial, *lingĝi* estis vualita de mistiko kaj oni ne povis racie utiligi kaj esplori ĝin.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, precipe en la movado de la granda kultura revolucio, la kuracaj kaj higienaj branĉoj de nia lando kombinis la ĉinan medicinon kun la okcidenta, mobilizis la amasojn por kolekti kaj esplori farmaciajn herbojn, kaj la mistika vualo de *lingĝi* estis malkovrita. En la lastaj jaroj, oni trovis multajn tiajn herbojn ne nur en la sudaj pluvozaj lokoj konvenaj al kresko de *lingĝi*, sed ankaŭ en norda kaj nordorienta Ĉinio kaj Kingzang-altebenaĵo.

Kemia analizo kaj farmacia provado montris, ke *lingĝi* povas fortigi la koron, protekti la hepaton kaj doni sedativan efikecon. Klinika uzado atestis, ke *lingĝi* havas efikon en kuraco de kronika traĥeito, koronaria kormalsano, stomaka ulcero k.a. Oni sukcesis ankaŭ en kuraco de iuj kazoj de kronika hepatito, artrito, alta sangpremo k.a. Preninte *lingĝi* malsanuloj ekhavis bonan apetiton kaj bonan dormon.

La naturaj herboj *lingĝi* estas ne multaj kaj la serĉado estas malfacila, tial ĝi ne povas kontentigi la bezonon de la amasoj en kuracado kaj preventado. En la granda kultura revolucio, sub la direktado kaj helpado de koncernaj sciencesploraj institucioj, multaj lokoj de nia lando sukcesis en kulturado de *lingĝi* post ripetada praktikado.

Nun kulturi ĝin en boteloj estas la ĉefa metodo. Oni uzas segaĵojn kaj branojn miksitajn kun dozo da akvo kiel kulturan perilon. Post inokulo de hifo de *lingĝi*, en konvenaj temperaturo, humideco kaj bona aerumado, la herbo elkreskis post ĉ. 2 monatoj. Nun multaj farmaciaj branĉoj de nia lando aplikas tiun ĉi metodon.

Per arte kulturita *lingĝi* medicinaj branĉoj jam produktis tinkturaĵojn, tablojdojn, siropojn kaj injektaĵojn por klinika uzado.

Ĉinaj Naciecoj

# UJGUROJ

de ZONGMIN

LA Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono estas loko kun pli ol 7,000,000 diversnaciecaj loĝantoj, el kiuj pli ol 4,000,000 estas ujguroj. Tie loĝas ankaŭ aliaj 12 naciecoj: hana, kazaĥa, huja, ĥalĥaza, mongola, taĝika, siboa, manĉura, uzbeka, tatara, dahura kaj rusa.

Antaŭ la Liberiĝo la diversnaciecaj popolanoj de Hingiang vivis en malluma abismo de suferoj pro la regado kaj subpremado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo. Post la paca liberiĝo de Hingiang en 1949 ili efektivigis sian regionan aŭtonomecon sub la briloj de la naciaj politikoj de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ. La kazaĥa, huja, ĥalĥaza, mongola, taĝika kaj siboa nacioj sinsekve starigis kvin aŭtonomajn subregionojn kaj ses aŭtonomajn guberniojn kaj surbaze de tio oficiale fondiĝis la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono en la l-a de oktobro de 1955. Sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ la diversnaciecaj popolanoj de la regiono uzas sian aŭtonomecon en la granda familio de la socialisma patrio kaj unuafoje en sia historio fariĝis mastroj de la ŝtato.

La ujguroj loĝas ĉefe en Hetian, Kaŝgar, Aksu kaj Korla ĉirkaŭ Tarim-baseno sude de Tianŝanmontaro. De multaj jarcentoj la feŭda terposedsistemo regis en tiuj lokoj. Tiam la bienuloj kaj kulakoj, kiuj okupis nur 8% de la tuta loĝantaro, posedis 40-50% de la tero, tial la malriĉaj kamparanoj havis malmulte da tero, tamen ili devis

*Maljuna ujgura laboristo instruas al riparistoj de antaŭurbo, kiel ripari agrikulturajn maŝinojn.*





*En la Kaŝgara Ĉapofabriko*

pagi per duono aŭ triono de la rikoltita greno terrentojn kaj diversajn impostojn. Krome ili devis senpage servi al bienuloj.

La ujguraj popolanoj kredis Islamon kaj ĝiaj temploj posedis teron. La templaj mastroj kiel la feŭdaj bienuloj kruele ekspluatis la kamparanojn kaj devigis en la nomo de la religio la kamparanojn, paŝtistojn, komercistojn kaj metiistojn pagi diversajn impostojn. La lokaj tiranoj kaj superuloj de Islamo starigis en koluzio religiajn tribunalojn en la regionoj multnombre loĝataj de ujguroj, kaj la laborantaj popolanoj ofte estis kruele punataj de la mastroj per skurĝado, iam eĉ per fortranĉo de membroj.

En la longaj mallumaj jaroj la ujgura popolo senĉese leviĝis al batalo por liberigi sin el la kateno de feŭdismo. Depost la 19-a jarcento imperiistoj entrudiĝis en Hingiang kaj perforte okupis ĝian vastan teritorion. Vizaĝe al la agresado de imperiismo la diversnaciecaj popolanoj heroe batalis unuj sekvante aliajn por defendi la naciajn egalecon kaj solidarecon kaj unuecon de la patrolando. En la periodo de 1933 ĝis la Kontraŭjapana Rezistmilito la Partio faris multajn revoluciajn laborojn en Hingiang kaj dank' al tio en 1944 eksplodis la batalo kontraŭ la reakcia regado de Kuomintango en la regionoj Jili, Taĉeng kaj Altaj. Tio montris ke la revolucia batalo de la popolanoj en Hingiang jam eniris novan stadion. La paca liberiĝo de Hingiang en 1949 malfermis novan paĝon de la historio de la diversnaciecaj popolanoj en tiu regiono. En la jaro 1951 Hingiang faris demokratian reformon kaj poste efektivigis agraran reformon sur la bazo de redukto de terrentoj kaj batalo kontraŭ lokaj tiranoj, tiel ke la feŭda ekspluata sistemo estis abolita. Post plenumo de la socialisma reformo al la agrikulturo en la regiono de ujguroj en 1957 rapide realiĝis popolkomunumigo en 1958.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio glore naskiĝis la revolucia komitato de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono je la kvina de septembro de 1968. Multaj eminentaj reprezentantoj de ujguraj laboristoj, kamparanoj kaj revoluciaj kadroj estis elektitaj kiel membroj de la revolucia komitato. Post la Liberiĝo la aŭtonoma regiono kulturis kaj nomis pli ol 100,000 kadrojn el nacimalplimultoj, el kiuj nemalmultaj nun plenumas gvidan laboron en diversnivelaj organoj. Ni prenu Turfan kaj Jeĉeng kiel ekzemplon. La nacimalplimultaj kadroj en ili okupas pli ol okdek pocentojn de la totala kadraro de la komunumoj kaj gubernioj.

En la pasintaj pli ol 20 jaroj la socialisma konstruado en la ujgura regiono rapide disvolviĝis. Antaŭ la Liberiĝo tie ne estis fera-ŝtala kaj tekstila industrioj, sed nun jam stariĝis multaj modernaj minejoj kaj fabrikoj de fero kaj ŝtalo, karbo, petrolo, elektro, metalurgio, kemio, tekstilado, agrikulturaj maŝinoj kaj aliaj. Samtempe sane kreskas la unua generacio de ujguraj laboristoj, kiuj jam formis armeon el 160,000 personoj.

Same kiel en aliaj lokoj de nia lando, la ujguroj disvolvis la amasan movadon **"lerni de Daĝaj en agrikulturo"**. La totala produktokvanto de greno en 1971 kreskis 2.9-oble kompare kun tiu de 1949, kaj la jara produktokvanto de kotono en 1971 kreskis 11-oble kompare kun tiu de la plej riĉrikolta jaro antaŭ la Liberiĝo. La totala areo de agroj

estis pligrandigita je 1.6-oblo kaj la areo de stabile altproduktaj kampoj atingis 100,000 hektarojn. Por venki la naturajn katastrofojn de sekeco, sablovento kaj sal-alkaleco la ujguraj popolanoj energie disvolvis akvoutiligan konstruadon kaj forstkulturadon por bridi sablon. La irigacia kanalo "La 18-a de Aŭgusto" konstruita de ujguroj de Minfeng-gubernio per ŝtonoj longas je pli ol 30 kilometroj kaj per sia akvo povas irigacii la kampojn de la tuta gubernio. Ili ankoraŭ konstruis en Turfan fame konata kiel "ventejo" pli ol 3,100 forstozonojn kun totala longeco de 2,100 kilometroj, tiel ke la vasta dezerto jam fariĝis fekundaj kampoj.

Post la Liberiĝo jam rimarkinde ŝanĝiĝis la kultura vivo de la ujguroj. La feŭdaj religiaj privilegioj estis abolitaj kaj la malnovaj rutinoj kun profundaj religiaj influoj estis forĵetitaj de la popolanoj. La libereco de geedziĝo estas garantiata per ŝtata leĝo. Nur nun la popolanoj vere ĝuas la liberecon en kredo de religioj. Frue en la jaro 1958 Hingiang jam fundamente ĝeneraligis la edukon de elementa lernejo kaj precipe la nombro de element- kaj mez-lernejanoj kreskis je 29% kompare kun tiu antaŭ la kultura revolucio kaj la nombro de ordinaraj mezlernejoj pliiĝis pli ol 30-oble kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo. En la eduka revolucio multaj eminentaj gefiloj de ujguroj estis senditaj al altaj lernejoj de la aŭtonoma regiono aŭ de Pekino, Ŝanhajo kaj aliaj lokoj. En 1959 la araba alfabeto de la ujgura lingvo estis anstataŭita de latina, kaj la nova skriblingvo estas bone akceptita de la ujguroj.

La ujguroj estas tre lertaj en kantado kaj dancado. La muziko kaj danco de la ujgura nacieco karakteriziĝas per la stilo de gajeco kaj klaraj taktoj. Ĝia literaturo kun sugesta humura enhavo kaj variaj formoj brilas per la saĝo kaj talento de la laboranta popolo. Kun prosperiĝo de la ujgura nacieco ĝiaj muziko, dancarto kaj literaturo fariĝis belega floro en la trezorejo de la kulturo kaj arto de la patrolando.

*Ujguraj komunumanoj pakas eksportotajn hami-melonojn.*



HISTORIAJ RAKONTOJ

# Rakontoj pri Li Ŝiĝen

LI Ŝiĝen (1518 - 1593 p.K.) estis ĉina eminenta medicinisto kaj farmakologo en Ming-dinastio. Li akumulis dum sia tuta vivo riĉan sperton en kuracado. Per ĉ. 30 jaroj li kaj liaj disĉiploj tralegis pli ol 800 verkojn, piediris dekmilojn da km. tra riveroj kaj trans montoj por konsulti ĉ. mil personojn kaj fine verkis la farmakopeon *Ben Caŭ Gang Mu.*

Ĝis nun ankoraŭ cirkulas la rakontoj pri Li Ŝiĝen inter la ĉinaj popolanoj.

## AKCIDENTO EN KURACADO

Ekde la aĝo de 24-25 jaroj, Li Ŝiĝen komencis sian kuracan servon. Dank' al la diligenta studado kaj ofta resumado de sperto, li rapide progresis en sia kuracarto kaj ĝuis tre grandan renomon inter la popolo.

Iutage, maljuna fiŝisto Pang maltrankvile invitis Li Ŝiĝen al sia hejmo. Enirinte la ĉambron, li trovis ke la edzino de Pang grave malsanas. Pang klarigis, ke lia edzino suferis de danĝera malsano, li prenigis al ŝi la drogan dekoktaĵon laŭ recepto de iu kuracisto, sed ŝia malsano fariĝis pli grava.

Li Ŝiĝen faris al ŝi diagnozon kaj donis urĝsavan drogon. Li poste tralegis la recepton faritan de la antaŭa kuracisto kaj konstatis ĝin ĝusta. Strange! Kial ŝia malsano fariĝis pli grava?

Li Ŝiĝen tuj kontrolis la dekoktitan drogaĵon kaj trovis en ĝi *Arisaema thunbergu*, kiun la recepto ne entenis, sed ne *Aconitum carmicheli* preskribitan. Li indigne diris: "Kiel oni povas preni la venenan *Arisaema* por *Aconitum*!"

Aŭdinte tion, Pang koleriĝis kaj blasfemis la apotekon. Li Ŝiĝen diris: "Tiu akcidento estas kaŭzita de malnovaj farmakopeoj. Iu el ili diras ke *Aconitum* alinomiĝas *Arisaema*. La farmaciisto eble konas tiun libron, tial li misdonis la drogon."

La malsanulino estis elsavita, kaj la akcidento ĉiam ondis en la cerbo de Li Ŝiĝen. Tio rememorigis al li la similajn okazaĵojn en la pasinteco: Iuj malnovaj farmakopeoj iukaze misrigardis unu specon de drogo kiel du, kaj alikaze misprenis du kun similaj nomoj kaj similaj aspektoj kiel unu. Tio rekte minacis la vivon de malsanuloj.

De tiam en la cerbo de Li Ŝiĝen aperis ideo mem kompili novan farmakopeon *Ben Caŭ.* En la antikveco plejparto de la ĉinaj farmakopeoj prenis al si tian titolon.

## KONOJ DONITAJ DE LABORULOJ

Post tio Li Ŝiĝen ĉiam kaj ĉie klopodis kolekti koncernajn materialojn. Multaj ordinaraj laboruloj donis al li valorajn konon kaj sperton pri kuracado.

En lia hejmloko sin trovis planto nomata stramonio, pri kiu mankis notoj en la pasintaj farmakopeoj. Foje, lignohakisto diris al li, ke engluto de semoj de tiu planto kun vino povas ridigi homojn. Tio multe atentigis Li Ŝiĝen. Post eksperimento li konstatis ke la planto havas narkotan efikon, kaj poste li aplikis ĝin en akupunkturo kaj kirurgia operacio. La moderna farmakologio ankaŭ konstatis, ke stramonio estas grava drogo en anestezado de la ĉina medicino.

Iun tagon, en iu kurierostacio Li Ŝiĝen vidis, ke veturigistoj de ĉevalĉaroj kuiras herbojn kun ruĝaj floroj. Li konis ke tiu herbo estas kalistegio, kaj aliris demandi por kio ili ĝin kuiras. Iu el ili respondis: "Ni tagnokte veturigas ĉarojn kaj estas penigaj kaj lacaj. Dekoktaĵo de tiu herbo povas preventi malsaniĝon kaj plifortigi korpon." Li Ŝiĝen notis liajn dirojn, kaj post pruviĝo de ĝia kuracefiko per eksperimento li skribis tiun herbon en *Ben Caŭ Gang Mu.*

Tiamaniere, Li Ŝiĝen akiris multajn verajn konojn de la popolamasoj.

## BLANKMAKULA SERPENTO

Blankmakula Serpento (*Agkistrodon acutus*) troviĝis nur en Kiĝoŭ-gubernio de Hubej-provinco,

la hejmloko de Li Ŝiĝen. Oni diris, ke "ĝi kun dentoj akraj kaj venenaj rampas fluge". La serpento estis valorega drogo kaj Li Ŝiĝen decidis fari al ĝi studon.

Tiun serpenton oni povis trovi nur sur Longfeng-monto norde de la urbo. Helpate de serpento-kaptisto li iris tien spite al danĝero kaj ĝin vidis. Ĝi estis venena serpento nigra kun blankaj makuloj kaj 24 romboformaj desegnoj ambaŭflanke sur skvamoj. Li propraokule vidis, kiom la serpento ŝatis manĝi planton *Piter nallichu Var. Hupehense* kun akra kaj fetora odoro, kiel oni kaptis, mortigis ĝin, forigis ĝian internaĵon kaj ĝin sekigis. Dank' al tio li akiris sufiĉan konon pri tiu serpento kaj poste li verkis specialan libron pri ĝi.

Li Ŝiĝen donis grandan atenton pri tia stud-metodo, opiniante ke nur tio povas havigi al li veran konon. Dum kompilado de la libro *Ben Caŭ Gang Mu*, kiam li ne bone konis aspekton kaj kreskadon de iu droga planto, li ĉiam persone iris por ĝin kolekti kaj observi.

Fruktiĝis la diligenta laborado de Li Ŝiĝen, kaj la farmakopeo *Ben Caŭ Gang Mu* estis verkita.

La libro kun 1,900,000 hanaj ideografiaĵoj kolektis 1,892 specojn da drogoj de plantoj, animaloj kaj mineraloj, el kiuj 374 ne troviĝis en la malnovaj farmakopeoj. Li faris al tiuj drogherboj relative sciencan klasifikadon, difinis iliajn nomojn, notis iliajn produktejojn, aspektojn, kolektmetodojn kaj preparadon kaj analizis iliajn karakterizaĵojn kaj kurac-efikojn. Por ke la posteuloj pli facile konu la drogherbojn kaj ne misuzu ilin, li aldonis al la libro 1,110 bildojn. Krome, ĝi kolektis 11,096 receptojn.

La farmakopeo *Ben Caŭ Gang Mu* kolektis kaj resumis la atingojn de la ĉina medicino antaŭ la 16-a jarcento. Ĝi estas nia grava medicina heredaĵo kun riĉa enhavo. Tiu verko estis tradukita en la lingvojn latinan, francan, japanan, korean, germanan kaj anglan kaj trovis vastan aprobon en eksteraj landoj.

## SEKRETO DE "DIA FRUKTO"

Sur iu montpinto norde de la templo Kvin Drakoj sur Tajhe-monto kreskis speco de arboj, kies trunko similas al ulmo kaj la frukto al umeo. La daŭistoj de la templo ĉiujare tributis ĝiajn konfititajn fruktojn al la imperiestro por flati al li, dirante ke ĝi estas "dia frukto" kaj oni povas, manĝinte ĝin, vivi senmorte. La loka registaro eĉ dekretis, ke neniu alia krom la daŭistoj estas permesita deŝiri la fruktojn.

Kiam Li Ŝiĝen venis tien, li, ne kredinte la vortojn de la daŭistoj, decidis persone gustumi tiun frukton por esplori ĝian veran valoron, spite de opono, malpermeso kaj eĉ vivdanĝero. Post esplorado li malkaŝis ĝian sekreton, ke tiu frukto povas produktigi salivon kaj kvietigi soifon kaj havas nenian dian efikon.

Tute ne zorgante pri la vivo de la popolo, la tiamaj regantoj ĉie serĉis "dian drogon" kaj "dian frukton", por ke ili vivu senmorte. Li Ŝiĝen faris batalon kontraŭ tiaj damnindaj agoj.



*Sur la Kovrilo:*

Sportaj amatorinoj de produkta brigado

*Sur la Dorskovrilo:*

Kunming-lago en somero




# EL POPOLA ĈINIO 人民中国报道

**Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO**

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

**N-ro 10 (183) 1973**


## Ĉefa Enhavo


Ĉinio gajnis abundan somerrikolton ................ 1

Kiel la nova Ĉinio solvis la problemon de greno? ...... 3

Akumulado de greno ..........................10

Parolo pri greno ..............................12

Novaĵoj sur la malnova paŝta vojo ................16

Nuna Siĉuan-a trafiko .........................18

Ĉina papermono .............................22

Veterana ministo Vu Hjuĝi ......................25

Ĉielarko ....................................29

Iom pri la evoluo de la klimato en Ĉinio dum la pasintaj 5,000 jaroj .................................30

Pekina biblioteko .............................34

La insula lando en Mediteraneo ..................36

Batalo de latinamerikaj landoj por nacia sendependeco ......................................39

Drogherbo Lingĝi ............................42

Ujguroj .....................................43


Rakontoj pri Li Ŝiĝen .........................46

# Ĉengdu

Ĉengdu, ĉefurbo de Siĉuan-provinco en la sudokcidenta Ĉinio, estas antikva urbo kun historio de pli ol 2,000 jaroj. Sub la direktado de la ĝenerala linio de la Partio **"streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie"**, la tuta loĝantaro de Ĉengdu transformis sian konsuman urbon en produktan. Nun en la urbo jam stariĝis industrioj de ferŝtalo, mekaniko, elektro, kemio, konstruaj materialoj, ŝpinteksado kaj malpeza industrio. Kaj ankaŭ ĝiaj publika trafikado, kulturaj aferoj, edukado kaj urba konstruado havas rimarkindan disvolviĝon.

Angulo de la nuna Ĉengdu. Maldekstre estis unu el ĝiaj stratoj antaŭ la Liberiĝo.






Laborejo de la Ĉengdu-a Fabriko de Senjuntaj Ŝtaltuboj



Kadro kaj laboristoj de la Maŝinfabriko Ruĝa Flago en Ĉengdu kune faras teknikan renovigon.



La Ĉengdu-a Fervoja Stacio — trafika pivoto en la sudokcidenta Ĉinio





La Pajla Kabano de Du Fu, kie vivis la fama poeto de Tang-dinastio, fariĝis publika parko.

# Brilfolia Flavkorno



Brilfolia flavkorno (*Xanthoceras sorbifolia*) de genro *Xanthoceras* el sapindaco troviĝas en Ĉinio relative vaste sude de la regionoj Huajhe-rivero kaj Kinling-montaro norde ĝis la okcidenta parto de Gilin, precipe multe en la provincoj Ŝenhi kaj Ŝanhi.

La planto kun granda ekonomia valoro povas doni oleon uzatan ne nur en industrio sed ankaŭ en manĝado, kaj ĝiaj kernoj servas kiel kruda materialo de proteino kaj amina acido. Post kresko de 2 aŭ 3 jaroj ĝi komencas fruktodoni. Post 20 jaroj ĝi eniras en prosperan periodon de fruktodono, kiu povas daŭri pli ol 200 jarojn. Ĝi estas adaptiĝema kaj havas relative fortan rezistivon kontraŭ sekegeco, frosto, salalkalo, sablovento kaj fiinsektoj. La ligno de la arbo estas malmola, kompakta kaj bruna kun bela vejnaro kaj forta rezistivo kontraŭ kaŭstikaĵo, estas bona materialo por altklasa meblaro. Ĝiaj prilaboritaj folioj povas esti uzataj por prepari trinkaĵon. Dum la lastaj jaroj, Liaŭning, Gilin kaj la Interna Mongolio sinsekve starigis forstumejon kun tiaj arboj kiel ĉefa plantaĵo, kies disvastiĝo havas vastan perspektivon en Nordo de Ĉinio kiel oledona arbo.

